



La egipta dancistino

TRI EROTIKAJ RAKONTOJ

Leopold Vermeiren

Flandra Esperanto-Ligo



La egipta dancistino

La egipta dancistino

TRI EROTIKAJ RAKONTOJ

Leopold Vermeiren

tradukis Lode Van de Velde

La egipta dancistino

Eldono de Flandra Esperanto-Ligo

Tiu ĉi e-libro estas mallongigita provversio kaj rajtas esti libere kopiata.

La dancistino de la mortinta faraono

Marko estis farinta longan poemon pri mortinta faraono kaj per ĝi gajninta premion: monsumon kaj libron pri la rava pasinteco de Egiptio, la lando ĉe Nilo. Estis ampleksa libro kun belegaj kolorfotoj, plejparte flavaj kaj brunaj; la flavo de la sablo kaj la bruno de la dezerto kaj la malnovaj temploj. Sed ankaŭ kun la pura bluo de la orientaj aroj kaj la oro de la trovitaj trezoroj en la tombejoj de la faraonoj.

Marko kaj Silvia kune rigardis la libron. Ili kuŝis unu apud la alia, tutsternite sur la longhara pelto de blanka lamo, kiun Silvia iam ricevis de maljuna ĉasisto, kiu sentis patran afekcion al ŝi; vere patran afekcion, sen pli.

Ili kuŝis apud la hejma fajrejo, estis preskaŭ vespero. En unu el la fotoj estis virino, kun la supra korpo nuda, belaj firmaj mamoj, tute oraj.

- Ora virino, diris Silvia.

- Ja bela, opiniis Marko.

- Ĉu vi volus min ora ankaŭ? Dum momenteto ŝi petole rigardis per siaj grandaj, bluaj okuloj.

- Eble jes, por unu fojo, sed mi ne estas faraono. Cetere, mi ŝatas viajn montetojn tiaj kiaj ili estas, sen oro. Ĉu vi permesas ke mi...?

Tiun tagon, ŝi portis longan robon, profunde dekolitan. Marko turnis sin sur sian flankon kaj metis sian manon al sub ŝia kolo.

- Ne, kara poeto, ne, ne,

- Ankaŭ ne se mi faros mian rakonton?

- Nu, pri Egiptio.

- Pri Egiptio? Bone. Donu al mi tri vortojn.
- Faraono... juna viro... juna virino, ŝi diris sen pripensi.
- Ho, kiom normala.
- Bone, mortinta faraono do. Juna viro, juna virino.

La vorto 'mortinta' iom timigis lin.

- Ĉu ne rajtas esti tutnormala sed vivanta faraono?
- Ne, Marko. Mortinta faraono. Mi volas ankaŭ unu el tiaj belaj tombejoj, piramidon.
- Nu bone: mortinta faraono, juna viro, juna virino.

Li tute turnis sin kaj rigardis dum iom da tempo en la fajron, kvazaŭ la lekantaj flamoj devus alporti inspiron.

- Iam estis virino, tre bela virino, kiu deĵoris ĉe faraono, li komencis.
- Ĉu estis sklavino, kara poeto? demandis Silvia.
- Prave, estis sklavino, Silvia, sed tre bela sklavino, kiu scipovis belege danci ankaŭ.
- Dancistino do. Kaj, kiel ŝi nomiĝis?
- Ŝi nomiĝis Eiristitis, tipa egipta nomo. Kompreneble la faraono posedis dekojn da aliaj sklavoj kaj sklavinoj. Inter ili, la tablopreparistoj havis elstaran rangon. Unu el ili estis bela viro, nur kelkajn jarojn pli aĝa ol Eiristitis.
- Kiom aĝa?
- Tiam, en tiu sunjaro, li fariĝis ĝuste dudek.
- Kaj kiel li nomiĝis?

- Lia nomo sonis Ab-sal-el-Ammon, sed pro ĝia longeco, preskaŭ ĉiuj nomis lin mallonge Ammon. Li havis grandajn, malhelajn, iom revemajn okulojn kaj estis bele formita.

Estas fakto ke tiu ĉi juna viro tute enamiĝis nian belan dancistinon, sed li ankoraŭ ne estis havinta la ŝancon sciigi tion al ŝi. Mi ankaŭ ne scias ĉu sklavo havis la rajton deklari sian amon al juna, bela sklavino, kiu ĉiutage dancis por sia faraono. Mi ne estas tiom bone informita pri la historio de la malnov-egipta epoko.

Ja eblas ke ankaŭ Eiristitis siaflanke estis foje rigardinta Ammon kaj eble leginta spuron de tiu amo en liaj grandaj, sopirantaj okuloj, sed ankaŭ tion mi ne scias, la historio ne mencias tion.

La faraono, tiutempe reganta Egiption, estis jam maljuna, tamen ankoraŭ tute sana. Pri tiu sano cetere zorgis armeon da kuracistoj kaj aŭguristoj. Sed malgraŭ tio, oni trovis lin, tute neatendite, iun matenon, morta en sia lito. Fiparolemaj langoj asertis ke li estis venenita, sed neniu iam povis pruvi tion. Sed ja certa estis la morto de la maljuna viro.

En la tuta lando regis granda malĝojo kaj dum pluraj tagoj Egiptio estis trempita en profunda funebro. Oni okazigis funebrajn procesiojn kaj de mateno ĝis vespero sonis trista muziko, dum elito de saĝuloj kaj specialistoj okupiĝis pri la enbalzamigo de la mortinta reĝo, la pretigo de la ĉerkoj kaj la finfarado de la tomboĉambro, meze de la granda piramido, jam konstruita jarojn antaŭe por iam fariĝi la majesta tombomonumento de la fama faraono.

Kaj laŭ tio ke proksimiĝis la tago de la entombigo, kreskis la streĉiteco en la urbo, kaj certe inter la sklavoj, ĉar multaj el ili akompanus la reĝon en la morton por pluservi lin en la postmorta mondo kun la samaj amo kaj dediĉo: kvin kuiristoj - dudek tabloservantoj - kirurgo - dek ĉambristoj - sep virinoj - kvin muzikistoj kaj dancistino. Tiujn kiuj ricevos la honoran taskon elektus Pluŝal, la kortega majstro.

Venis la tempo kaj la elekto de Pluŝal, rilate la dancistinon, estis Eiristitis, ĉar ŝi estis ege bela kaj lerta pri dancado. Kiam oni sciigis al Eiristitis la decidon de la kortega majstro, ŝi tre malĝojis, ĉar ŝi estis ankoraŭ tiom juna kaj ŝi amis la vivon. Sed ŝi neniel rimarkigis la malĝojon; ja ne estus

dece ke ŝi, la elektito por pluservi la faraonon post lia morto, montru ajnan spuron de tristeco. Ŝi sciis tion, ŝi devus senti sin honorita pro la elekto, sed plej profunde en sia koro, ŝi estis tre malĝoja. Sed seeble eĉ pli malĝoja ol la juna virino estis Ammon, kiam li aŭdis la novaĵon. Li ne povis kredi sian orelojn. Li retiris sin en malluman angulon de la palaco kaj ploris amarajn larmojn.

- Ke tio devos okazi al mia amatino, veis li. Kiel eblas? Se mi nur povus, anstataŭ ŝi eniri la morton.

Li ne sciis kion fari kaj, senkonsila, li iris al Kseres, maljuna sklavo, de ĉiuj nomita la saĝulo.

La grizharulo profunde rigardis la okulojn de la juna viro kaj eĉ antaŭ ol Ammon povis malfermi sian buŝon, li diris:

- Kial via animo estas tiom profunde malĝoja, Ammon? Ĉu ekzistas io en la vivo kio, en via junaĝo, meritas tian tristecon?

- Mia animo estas malĝoja ĉar ŝi, amata de mi, devas morti, Kseres, respondis la juna viro.

- Eiristitis, la juna dancistino?

Ammon kapjesis.

- Kiel vi scias, Kseres?

- Mi legis tion en viaj okuloj dum vi rigardis ŝin, junulo.

Ammon suspiris.

- Kiom volonte mi anstataŭ ŝi enirus la morton, Kseres. Ĉu vi pensas ke Pluŝal akceptus mian oferon, se mi ĝin proponas?

Kseres skugetis sian kapon.

- La ofero de nobla animo certe plaĉus al la dioj kaj nia mortinta faraono, Ammon. Kaj la vivo de nia bedaŭrata faraono en la postmorta mondo vere gajiĝus. Sed dancistino estas por la faraono postmorte

nemalhavebla kaj neniuj viroj povas anstataŭi ŝin, kiom ajn nobla estas liaj sentoj. La dancistino povas anstataŭi nur alia dancistino. Mi bedaŭras, juna amiko mia, sed kiel viroj vi havas neniun ŝancon.

- Sed Kseres, ankaŭ mi scipovas danci. Mi estas denaska dancisto, vi ja scias. Mi eĉ scipovas versi dancante kaj mi bele kantas miajn versojn je belaj, memkomponitaj melodioj por mia reĝo.

Sed Kseres denove skuetis la kapon.

- Ne, Ammon, amiko mia, mi ripetas, eĉ kvankam mia animo bedaŭras ke mi devas elrevigi noblan homon: kiel viroj vi havas neniun ŝancon, dancistino povas anstataŭi nur alia dancistino kaj neniuj dancistino pretos fari tion por vi, nek por Eiristitis. La vivo kiel ofero estas al plej multaj homoj tro granda.

Vi jam komprenas: Ammon estis plej elrevigita, malĝoja. Li retiris sin kaj ekkuŝis en la ombro de palmo, inter du ŝtonoj kun la vizaĝo fronte al Nilo. La akvo, kies nivelo estis tre malalta, malrapide fluis norden.

- Ho potencaj dioj, preĝis Ammon, kompatu koron de amo ardanta kaj kies amato estos morgaŭ oferata. Mi petegas vin, kompatu. Mi faros ĉion kion vi deziras de mi, nenia ofero estos tro peza al mi.

Kaj tiam, kun la lastaj vortoj, estis kvazaŭ vento blovis super la akvo riverborden kaj samtempe Ammon ekhavis strangan senton. Ne, ne estis vento, sed la aero kiu ĉirkaŭ li komencis vibri. Sur la ĵus sensulka akvosurfaco aperis tri cirkloj. Ammon levis sin kaj rigardis mire, ankaŭ iom timeme ĉirkaŭen. Neniu videblis en la proksimaĵo kaj tamen li klare aŭdis voĉon kiu parolis la jenajn vortojn:

‘Ĉiam venkas la amo, Ammon.’

‘Amo estas eltrovema.’

‘Kaj neniuj posedas la dancarton kiel vi.’

‘La dancado estas en via sango.’

Ammon haste ekstaris. Li rigardis spure ĉirkaŭ si sed neniu estis. Kaj tamen li vere estis aŭdinta la voĉon. Li sciis ankoraŭ laŭvorte kion ĝi diris:

‘Ĉiam venkas la amo, Ammon.’

‘Amo estas eltrovema.’

‘Kaj neniu posedas la dancarton kiel vi.’

‘La dancado estas en via sango.’

Ammon ne povis kompreni. Aŭ ĉu tamen? Ĉu estis la voĉo de la dioj, de kiuj li ĵus petis helpon?

Li denove rigardis en la direkton de la akvo. La strangaj cirkloj estis for.

Li venis de sub la palmo kaj promenis kun klinita kapo, profunde enpenŝiginta laŭ la rivero.

‘Ĉiam venkas la amo, Ammon.’

‘Amo estas eltrovema.’

‘Neniu posedas la dancarton kiel vi.’

‘La dancado estas en via sango.’

Ĉu en tiuj ĉi kelkaj vortoj estas kaŝita la sekreto de la helpo de la dioj? 'Neniu posedas la dancarton kiel vi' li ripetis duonvoĉe, kaj subite Ammon konis la signifon de la diaj vortoj. Li devis danci, li devis kiel dancisto kuniri en la tombejon de la faraono. Sed vira dancisto ne estus akceptata. Li do devus proponi sin kiel virino, li devus maskovesti sin. Tio estis kion la dioj flustris al li en la orelojn. Ili pravis: amo estas eltrovema!

Ammon ekkuris kaj la unuan fojon post multaj horoj li ridis.

Kiam li atingis la urbon, li iris al sia amiko Filis kaj diris:

- Filis, vi devas helpi min, urĝe helpi, estas afero de vivo kaj morto.
- Kiel mi povas vin helpi, Ammon?
- Vi povas helpi min, nur vi. Mi volas, por unu tago, aspekti kiel juna, plaĉa virino.
- Filis, kiu konis sian amikon Ammon jam jarojn, estis tute surprizita. Li eksidis.
- Sed, amiko, balbutis li, kiel...
- Nenion demandu, Filis, faru kion mi diras al vi, mi petegas, kiel amiko.
- Bone, kapjesis Filis. Sed atentu, Ammon, vi estas ankoraŭ juna, bone pripensu kion vi volas. Profunde pripensu, tiel ke vi poste ne bedaŭros. Io maltrankviligas min, Ammon. Estas stranga vervo en viaj okuloj. Se mi estus vi...
- Faru kion mi petas, Filis, faru rapide kaj bone. Estas la deziro de la dioj.

Denove Filis surpriziĝis.

- La deziro de la dioj?
- Jes.
- Nu, tiam mi faros, se vi pensas ke estas la deziro de la dioj.

- Jes, faru, Filis, faru plej sekrete. Al neniŭ rakontu, se vi volas daŭre nomi vin mia amiko.

- Mi tiel faros, Ammon. Venu kun mi al la teatrejo.

Filis estis la viro kiu vestis la aktorojn kaj ŝminkis ilin antaŭ iliaj prezentadoj. Li estis faranta tion jam jarojn kaj neniŭ estis tiom sperta kaj lerta kiel li. Pro tio ke ankoraŭ estis frue en la tago, la teatrejo estis senhoma. Tamen Filis sentis certan maltrankvilon. Li ja volis renkonti neniun.

- Venu Ammon, ĉi tien.

Ili atingis malgrandan ejon, malantaŭ la scenejo.

- Eksidu, Ammon. Kia vi volas...?

- Transsorĉu min en dancistinon, Filis, junan, plaĉan dancistinon.

- Sed, Ammon...

- Faru, faru kion mi petas, Filis.

- Jes, bone. Mi faros por vi. Eksidu.

- Ĉu estos malfacile, Filis?

- Ne, ne malfacile. Rigardu vian propran vizaĝon en la spegulo, Ammon, via haŭto estas ankoraŭ tiel mola kiel de virino. Nur via barbo...

- Jes, mi komprenas. La barbo devos esti for.

- Bedaŭrinde, via barbo, amiko mia. Ĝi estas tre bela.

- Kaj miaj haroj? Kion vi faros pri miaj haroj?

- Simple. Mi aranĝos ilin alimaniere. Viajn okulharojn mi devas plilongigi

iom kaj la brovoj devas esti malvastigitaj kaj longigitaj. Vi havas belajn, malhelajn okulojn, Ammon. Nur tiu barbo... sed mi ja sukcesos forigi ĝin.

- Kiumaniere vi forigos ĝin?

- Mi razos ĝin plej mallonga kaj poste uzos specialajn kremojn kaj pomadojn. Ne zorgu pri tio. Ja ankoraŭ restas iu aĵo.

- Kio do?

- Jes, permesu ke mi mencias tion, sed necesas. Mi alcelas la mamojn, Ammon.

- Ho, jes... tio ja estas iel solvebla, ĉu ne?

- Certe, Ammon. La dancistinoj ĉiam portas longan, silkan robon etendiĝantan ĝis la maleoloj, kaj fermitan ĉirkaŭ la kolo. Junaj, belaj dancistinetoj ofte havas fajnajn sed malgrandajn mamojn. Mi streĉos zonon ĉirkaŭ vian bruston kun du volviĝoj en la ĝusta loko. Tiuj akcesoraĵoj estas ne malofte uzataj en la teatra mondo. Kaj vian faluson mi forligos per tuko. Vi do ja devos resti trankvila dum vi dancas, ne tro ekscitiĝu, se vi komprenas kion mi alcelas. Mi ja neniom komprenas de la tuta afero. Ĉu temas pri ludo, pri ŝerco, Ammon?

- Ammon peze suspiris kaj en liaj okuloj venis trista rigardo.

- Ne, se estus nur ludo, Filis. Sed do, ni silentu pri tio. Estas la deziro de la dioj. Daŭrigu kaj ne plu demandu, amiko mia.

Filis siavice suspiris sed silentis kaj komencis sian taskon. Kiam la malhela barbo de Ammon estis fortranĉita kaj forrazita, li ekprilaboris la haŭton de sia amiko per kremoj kaj pomadoj, ĝis ĝi fariĝis glata kiel tiu de la vizaĝo de juna virino. Poste en la vico venis la okuloj. Ammon devis teni ilin fermitaj dum longa tempo. Kiam li ne plu sentis la manojn de Filis, li remalfermis ilin.

- Rigardu Ammon, rigardu la spegulon.

Kaj Ammon rigardis. Li ne povis kredi siajn okulojn.

- Ĉu tio estas mi? murmuris li, preskaŭ enamiĝante la virinon kies kapon li vidas antaŭ si en la spegulo. Sed estis liaj propraj okuloj. Li ja havis strangan, ruĝan buŝon.

- Malvestu vin nun, Ammon, sed estu singarda por via ŝminko kaj viaj haroj.

- Malvesti min? Tute?

- Jes, estas necese. Senveste, krom viaj sandaloj.

- Nu, bone.

Ammon malligis sian zonon kaj lasis siajn robon kaj lumbotukon fali surplanken. Tie li staris belega: juna viro kun la korpo de junulo sed la vizaĝo de virino.

Filis admire rigardis la de suno brunigitan korpon kaj la faluson kiu elegante pendis malsupren, apoganta sur la peza, maldense harkovrita sako kun la du rondaj juveloj.

- Ja domaĝo ke tiu ĉi bela parto devas esti forligita, ŝercis li.

- Tiam lasu tion, Filis. Tiel ĉi mi estos pli libermova. Mi ja regos min, estas afero de vivo kaj morto, do ...

- Bone, laŭ via plaĉo, Ammon. Sed mi refoje avertas vin: ne lasu vin ekscitiĝi kaj vian korpon stimuliĝi dum la dancado.

- Mi ja atentis pri tio, mia amiko. Sed nun ligu al mi la bruston, por ke mi povu vesti min kiel juna virino per longa, silka robo kaj rigardi la rezulton.

Filis turnis sin kaj fortiris kurtenon de antaŭ ŝranko. Tie pendis dekoj da vestoj.

- En kiu koloro mi vestu vin, Ammon? Viaj brunaj okuloj kaj malhelaj haroj postulas ruĝan aŭ verdan koloron. Verdo estas la koloro de espero, Ammon.

- Ne, prenu ruĝon.

- Ruĝo estas la koloro de amo, Ammon. Mi tute ne plu komprenas. Enamiĝo dezirigas al virino, ne al la aspekto de virino.

- Ruĝon, mi diras al vi, Filis, prenu ruĝon, belan delogan ruĝon. Kaj ne demandu plu.

- Bone, bone. Tiam mi ankaŭ ligos ruĝan zonan ĉirkaŭ vian torson, brusto kun prudaj, malgrandaj mametoj de juna dancistino.

- Jes, faru tion. Faru bone kaj faru rapide.

Filis malfermis tirkeston kaj revenis kun tri silkaj zonoj. Li metis ilin ĉirkaŭ Ammon unu post la alia kaj ĉiufoje li iris malgrandan distancon por povi pli bone vidi la rezulton.

- La dua plej taŭgas, juĝis li. Tiun mi metos ĉirkaŭ vin, amiko mia.

Kaj tiel li faris.

- Iru nun antaŭ la grandan spegulon kaj lasu min rigardi vin.

Ammon staris tie nuda kiel juna dio kun la kapo kaj la malgrandaj, kovritaj mametoj de juna virino. Li rigardis sin mem kaj instinkte li metis sian manon antaŭ sian viraĵon; li mem sentis ke la faluso ne akordis kun la tuto.

- Bele, murmuris Filis, bele. Mi apenaŭ povas mem kredi ke estis mi kiu faris vin tiom bela. Nun ni pensu pri nomo. Kiel mi nomu vin, juna diino?

- Nomu min 'Amiŝ', respondis Ammon, dum li rigardis sin en la spegulo.

Filis iris al ĉe li kaj ligis al li malgrandan silkan tukon inter la gambojn.

- Kion vi faras nun?

- Mi volas vidi vin tute kiel virino, Ammon. Jen... Nun metu viajn manojn super vian kapon, Amiŝ, mia juna diino. Tiel, jes, kaj unu genuo iom antaŭen. Vi efektive estas tre bela kaj tenta.

Li alproksimiĝis al sia kreitaĵo, Amiŝ. Li sentis moviĝon, li sentis sian sangon flui pli rapide kaj sian obeliskon kreski pli alten. Lin kaptis la dezirego karesi la ruĝvelurajn mamojn kaj ĉirkaŭbraki Amiŝ. Sed li bridis sin, ne estis dece. Troviĝis tro trista rigardo en la okuloj de Amiŝ. Rapide Filis sin turnis kaj prenis la ruĝan robon.

- Vestu vin, diris li per sinrega voĉo.

- Sed Filis, kio okazas al vi?

- Nenio, Ammon. Vestu vin.

Ammon surmetis la robon. Li singarde faris por ne tuŝi sian hararanĝon.

- Fiksu ĝin ĉirkaŭ viajn lumbojn, Ammon. Eksidu ĉi tie. Nun mi devas prilabori viajn manojn kaj piedojn. Aŭ pli bone, mi metos al vi silkajn gantojn. Vidu, kaj ĉi tio estas ora ringo kun verda ŝtono.

- Verdo, koloro de espero, Filis. Tion vi diris, ĉu ne?

- Efektive, koloro de espero, mia amiko.

Ammon havis bele formitajn piedfingrojn kun firmaj ungoj.

Filis kolorigis la ungojn ruĝaj kaj metis la piedojn en fajnajn, helbrunajn sandalojn.

- Jen, kara feino, nun vi estas preta. Lasta konsilo: kiam vi devas danci, ne forgesu dum la danco ke vi estas virino. Kie ajn vi restados, kion ajn vi faras, ne denuncu vian veran naturon.

- Tion mi ne forgesos, Filis, neniun momenton tio foriros el mia kapo. Al vi pagi mi ne povas, sed la dioj rekompencu vin. Mi restos eterne dankema pro via helpo.

Pluŝal, Deris kaj Ozobin, tri altranguloj, gemute sidis kune. Hodiaŭ estis ankoraŭ relative trankvila tago, sed morgaŭ fariĝos des pli okupita. Ja morgaŭ la mortinta faraono estos entombigata.

La sklavoj, kiuj devis kuniri en la morton, estis jam elektitaj. Inter ili ankaŭ la bela Eiristitis, la dancistino. Ja domaĝe, sed la estraro de saĝuloj, inspiritaj de la dioj, estis elektinta ŝin do.

La tri altranguloj pasigis la tempon per siaj damludoj, trinkante freŝan vinon.

Subite iu frapis sur la pordon. Servanto sinkline aperis en la pord-aperturon.

Pluŝal levis la okulojn kolere.

- Iŝel, mi ja diris ke ni ne volas esti ĝenataj.

- Iu urĝe volas paroli kun vi, sinjoro.

- Mi estas por neniuj disponebla, ĉu vi komprenas? Kiu estas?

Denove la servisto klinis sin ĝis preskaŭ sur la plankon.

- Juna virino, sinjoro.

- Juna virino?

- Jes, sinjoro. Ŝi diras ke estas tre urĝe. Ŝi estas sendita de la dioj.
- Sendita de la dioj?

Pluŝal, daŭre tenanta sian vinpokalon enmane, starigis ĝin.

- Kiu estas tiu virino? Kio estas ŝia nomo?
- Ŝi nomas sin Amiŝ, sinjoro.
- Amiŝ? Neniam aŭdis pri ŝi. Lasu ŝin enveni.

La servanto trian fojon kliniĝis, turnis sin kaj ebligis la eniron.

Juna, alta virino en larĝa, vinruĝa robo pendanta ĝispiede, ŝovis sin en la ĉambron. Ŝi havis gracian, elegantan irmanieron.

Pluŝal ricevis la impreson ke ŝi promenis sur siaj piedfingroj. Sed ne, ŝi ne promenis, estis kvazaŭ ŝi ŝvebis. Ŝi ne mallevis la okulojn dum Pluŝal rigardis ŝin avide. Ŝi havis grandajn, malhele brunajn okulojn kaj longajn okulharojn. Ŝi ankaŭ havis grandan, ruĝan buŝon kaj sub ŝia robo li supozis du junajn, fajnajn sed fortikajn mametojn kies cicoj konture videblis kiam ŝi turnis sin al li. Ŝi ekparolis antaŭ ol Pluŝal havis la ŝancon fari demandon. Ŝi parolis per vualita, preskaŭ afekta voĉo kiu certe pro tio havis tentan sonon.

- La dioj sendis min al vi, sinjoro, parolis ŝi. Mi estas la juna Amiŝ kaj venas de trans Nilo. Erino, mia servanto, portis min ĉi tien per sia boato. La dioj aperis al mi pasintan nokton kaj donis al mi taskon. Ili sendis min al vi, sinjoro Pluŝal, ĉar vi nun estas la reganto kaj decidis pri vivo kaj morto.

Dum ŝi parolis, la virino staris senmova kaj alrigardis Pluŝal la tutan tempon per siaj grandaj, penetraj okuloj.

- Kiel sonis la mesaĝo de la dioj? demandis li.

- Amiŝ akompanu al la faraono en lian tombejon kaj dancu por li. La dancistino Eiristitis ne iru kun li. Ŝi restu la dancistino de la nova, juna faraono.

- Eiristitis? Kiel scias vi ŝian nomon? Trans Nilo neniu scias kiuj estas la elektitoj.

- La dioj menciis al mi ŝian nomon. Amiŝ iru anstataŭ Eiristitis, kune kun la mortinta faraono en la tombejon, por ke nia faraono vivu eterne.

Pluŝal, jam trinkinta sufiĉe da vino, preskaŭ sobriĝis aŭdante ĉion ĉi. Kaj ankaŭ la du aliaj saĝuloj, Deris kaj Ozobin, rigardis strange. Deris estis la unua kiu retrovis sian parolkapablon.

- Kiel ni povas scii ke vi parolas la veron? demandis li.

- Kiu propravole enirus la morton sen la voko de la dioj, sinjoro?

- Kaj kiu diras ke vi scipovas danci? enmiksis sin Ozobin en la konversacion.

- Jes, samopiniis Pluŝal. Ĉu vi ja scipovas danci? Nu, montru, dancu por ni.

- Jes, dancu por ni.

- Mi dancos por vi, respondis la virino. Plenigu vian pokalon per ruĝa vino. Mia lasta danco en la taglumo estu amdanco.

La virino interfrapis la manojn kaj aperis juna viro kun longa fluto, tranĉita el Nila kano. Li sidigis sin kaj komencis ludi malrapidan, orelkaresan

melodion. La dancistino unue kaŭriĝis kaj poste starigis sin malrapide. Estis kvazaŭ ŝi daŭre levadis sin ĝis kiam ŝi staris alte sur la piedfingrojn, la kapo levita, la manoj altaj, manoj kiuj sidis en delikataj, silkaj gantoj, longaj gantoj kiuj malaperis en la larĝaj manikoj de la robo.

Pluŝal povis vidi nur la fajne formitan vizaĝon kun la grandaj okuloj kaj la pezaj okulharoj, ĝis kiam la rigardo de liaj okuloj falis sur la junajn mametojn, kiuj akre konturiĝis kontraŭ la supra, ruĝa robo.

Kaj tiam, je la tonoj de la muziko, la dancistino komencis luli brakojn kaj koksojn, dum ŝi subtile ŝvebis antaŭen, ŝi turnis sin elegante kaj fleksis la genuojn alterne tiel, ke la femuroj videble konturiĝis kontraŭ la fajna, supra robo.

La muziko restis milda kaj kuntrena, tiel ankaŭ la ondaj movoj de la svelta korpo. Efektive estis amdanco, ruĝa amdanco, danco de spirita sed ankaŭ korpa deziro. Ĝi stimulis la tri maljunajn virojn ĝis kiam ili ekanhelis. Ili trinkis la ruĝan vinon kun avidaj glutoj.

Pluŝal havis sian pokalon en la dekstra mano, dum li per la maldekstra sin kaŝe karesis inter la femuroj. Liaj lipoj malsekiĝis pro deziro kaj ĉiun sekundon lia deziro kreskis. Tiu juna virino antaŭ li dancis die. Kiam ŝi deĵetos sian robon? Li sopiris vidi la junajn mamojn, li volis rigardi la nudajn femurojn kaj la movojn de ŝia malhela, senripoza sino. Sed Amiŝ ne pretigis sin por senvestiĝi, ŝi daŭre dancadis la tutan tempon, volvita en la maldika, silka robo kiu supozigis ĉion sed malkaŝis nenion.

Ĝis kiam Pluŝal ne plu povis sin regi.

- Malfiksu la robon, faligu la robon! vokis li per raŭka voĉo. Ne, ne vere estis voko, sed anhelilo.

- Jes, for la robo! vokis Deris kiel Pluŝal. Kaj ankaŭ la okuloj de Ozobin estis grandaj pro sovaĝa deziro.

Dum momento la juna virino hezitetis, sed ŝi reregis sin rapide kaj pludancis. Kaj dancante, ŝi diris:

- Estas la volo de la dioj, Pluŝal, kortega majstro. Vi por neniu homo plu senvestiĝu, Amiŝ. Nuda, vi dancos nur por via faraono, por la mortinta faraono en la vivo postmorta.

Kaj ŝi pludancis. Pluŝal, kvazaŭ ŝtoniĝinta, restis sidanta en sia loko, kiel ankaŭ Deris. La voĉo de la dioj ja estas sankta. Sed Ozobin, ĵus fintrinkinta sian pokalon kaj ne aŭ nur duone aŭdinta la vortojn de Amiŝ, ekstaris. Li faris kelkajn paŝojn en la direkton de la juna virino. Ĉu li intence kaptis al ŝi, vere por kapti ŝin? Aŭ ĉu estis la vino kiu perdigis al li la ekvilibron? Kiel ajn, li subite svingis la brakojn. Amiŝ ankoraŭ provis eviti lin per eleganta turno sed ne povis preventi ke Ozobin kroĉis sin al la robo. Lia pokalo kun vino falis surteren kaj rompiĝis kun mallonga krako. En la sama momento la ruĝa robo ŝiriĝis laŭ la tuta longo. Estis nur unu hurlo, hurlo de timo, eskapanta el la buŝo de Amiŝ.

La robo falis surteren kaj la dancistino staris nuda antaŭ la tri ebriaj viroj. Pluŝal eksaltis sur siajn piedojn. La mamoj de la virino estis ankoraŭ kovritaj per ruĝa, silka robo sed lia okulo ne rigardis la bruston. Lia rigardo abrupte trafis la malluman sinon, kie li rimarkis la pezan, viran faluson.

- Estas viro! Tiu dancistino estas viro! hurlis li.

Ankaŭ Deris eksaltis kaj vokis

- Trompo! Estas viro. Malsanktigo! Estas viro!

Ammon paliĝis pro timo. Lia plano, lia bela plano malsukcesis pro stulta hazardo. Abrupte li ĉesis la dancadon, ankaŭ ne plu estis muziko. Kien

iris la flutisto? Ĉu li jam fuĝis el la ĉambro?

Tia ĉi delikto estas punata per kruela morto, sciis Ammon. Lia okulo rimarkis malfermitan fenestron. Per unu salto li atingis ĝin.

- Haltigu lin! Gardistoj!

- Perfido! Perfido! Malsanktigo!

Rapide kiel eblas ili kuris al Ammon, sed memkompreneble la juna viro estis pli rapida. En malpli ol unu sekundo li estis ĉe kaj tra la fenestro. Li fortiris la ruĝan tukon de sia brusto, forviŝis la okulharojn de siaj okuloj kaj pasigis la fingrojn de ambaŭ manoj tra la bele aranĝita hararo.

Jen, denove li aspektis kiel viro. Nun ankoraŭ tra tiu ĉi ĉambro kaj li estus ekstere. Ili devus kuri rapide por ankoraŭ kapti lin.

Estis malgranda, malluma ĉambro sen fenestro al ekstere kaj nur unu pordo. Per du saltoj li atingis ĝin.

Bedaŭrinde, la pordo estis ŝlosita de ekstere. Ammon tiris per ĉiuj siaj fortoj je la pordanso, sed sen rezulto. Li provis trarompi la pordon per sia ŝultro sed ĝi cedis eĉ ne unu colon. De ĉiuj flankoj li ekaŭdis kriojn.

- Perfido! Helpu! Haltigu la herezulon!

Ammon suspiris peze. Restis nur unu elirejo: reen tra la malfermita fenestro al la ĉambro en kiu troviĝis Pluŝal, Deris kaj Ozobin.

Kiam li trasaltis ĝin duan fojon li eĉ ne atingis la plankon. Li estis ja kaptita de dek manoj. La ĉambro estis plena je vokantaj kaj kriantaj servistoj, inter kiuj Ammon konis neniun. Ili metis al li krudan, jutan robon

ĉirkaŭ la korpon kaj ligis liajn manojn. Ammon komprenis neniom de ĉio ĉi. La dioj ne favoris lin. Kaj tamen ili estas donintaj al li antaŭ kelkaj horoj la taskon, almenaŭ li tiel komprenis. Ili ja estis flustrintaj en lian oreilon:

‘Ĉiam venkas la amo, Ammon.’

‘Amo estas eltrovema.’

‘Neniu posedas la dancarton kiel vi.’

‘La dancado estas en via sango.’

Aŭ ĉu li estis nur sonĝinta tion? Ĉu li estis pensinta siajn dezirojn vero?

Rezigne, la kapo profunde klinita, li obeeme lasis ilin forporti lin.

Oni ĵetis lin en malluman karceron. Tie, li ricevis ruĝan vinon kaj panon.

Ĉu Pluŝal mem rakontis? Ĉu Deris aŭ Ozobin? Aŭ ĉu la servistoj ne povis silenti? Kiel ajn, la novaĵo sin disvastigis kiel fajro tra fojnostako, ke viro, vestita kiel juna, gracia virino volis transpreni la lokon de la bela Eiristitis kaj ke la juna viro nomiĝis Ammon.

Tiel finfine la novaĵo atingis ankaŭ la orelojn de Eiristitis mem, kiu pro tio estis tre trista kaj samtempe tre ĝoja. Ŝi ja konis Ammon, ŝi sciis ke Ammon ofte rigardis ŝin kun deziraj mienoj. Kaj ankaŭ ŝi ofte rigardis lin, sed pli kaŝe, tiel ke li ne povis scii. Kial do Ammon elpensis kaj faris ĉion ĉi? Kial li volis por ŝi eniri la morton? Tio povus esti nur pro amo. Tio estis kio samtempe ĝojigis kaj profunde tristigis ŝin.

Estis al ŝi konsola penso ke ambaŭ ili ja la saman tagon eniros la morton. En la postmorta mondo, ili povus kune pluvivi, proksimaj unu apud la alia

kaj eterne longe. Estis la volo de la dioj.

Sed subite ŝiaj pensoj morniĝis. Kiel ŝia amato devus morti? Ĉu oni pro malamo ne bruligus lian korpon, por ke ŝi neniam plu ricevu la ŝancon revidi lin en la postmorta mondo?

Nun ne plu estis ĝojo en ŝi, nur malĝojo. Post lia sakrilegia trompo oni certe mortigus lin per senhonora morto, por ke la postmorta mondo neniam malfermiĝu al li.

Eiristitis sidigis sin kaj metis la manojn antaŭ la okulojn. La larmoj libere kuris sur ŝiaj manoj. Ŝiaj manoj fariĝis tute malsekaj de la larmoj.

‘Ĉiam venkas la amo.’

‘Amo estas eltrovema.’

Strange. Kial tiuj pensoj tiel subite venis en ŝian kapon? Ĉu estis inspiro de la dioj? Ĉu la dioj estus favoraj al ŝi? Ŝi forigis la manojn de antaŭ siaj okuloj. Ŝiaj larmoj sekiĝis. Ŝi ekstaris kaj komencis pensi profunde. Kion ŝi povus fari por sia amato, li kiu volis oferi sian vivon por ŝi? Ŝia frunto sulkiĝis. Jes, estas decidite, ŝi devas fari ion por li.

Nu, en Egiptio, almenaŭ en tiu tempo, estis tiel ke la sklavo, kiuj devis la sekvantan tagon eniri la morton, rajtis esprimi lastan deziron. Plej multaj el ili, kiuj la tutan vivon estis manĝintaj nur panon kaj fruktojn, elektis reĝan manĝon konsistantan el multaj sinsekvaj pladaroj, kun abunde da vino. Aliaj preferis esti tutan tagon riĉe vestitaj kaj fari veturon en kaleŝo kun kvar blankaj ĉevaloj enjungitaj, veturo kiun riĉuloj povis permesi al si nur je festotagoj, ĉar blankaj ĉevaloj estis tre raraj, do tre altekostaj.

Do ĉiuj rajtis esprimi sian deziron, same Eiristitis, lastan deziron, la tagon

antaŭ ol ŝi devus eniri la tombejon de la faraono, por neniam plu forlasi ĝin. Demandita pri ŝia deziro, ŝi restis silenta dum longa tempo, profunde pensanta.

‘Ĉiam venkas la amo.’

‘Amo estas eltrovema.’

Strange, tiuj du magiaj frazoj denove ludis tra ŝia kapo. Kaj subite ŝi vidis klare. Ŝi ridetis.

- Ankoraŭ unufoje mi volas vidi la viron, kiu anstataŭ mi volis morti, diris ŝi. Mi volas esti kun li la tutan nokton. Estas la volo de la dioj.

Kiam la gardistoj aŭdis tion ĉi, ili estis tre konsternitaj. Ili raportis la mesaĝon al Pluŝal, sed tiu ĉi tuj malaprobis la deziron kun abomeno.

- Ĉion la dancistino Eiristitis rajtas deziri, diris li, sed ne la kuneston kun Ammon, la herezulo, kiu estas jam kondamnita al morto kaj morgaŭ mortos sur brulŝtiparo. Demandu ŝin denove. Ŝi rajtas deziri ĉion kion ŝi volas. Sed ne tion ĉi.

La gardistoj venis ĉe la dancistinon duan fojon kaj transdonis la vortojn de Pluŝal. Sed Eiristitis skuis la kapon.

- Mi ne rezignos mian deziron, diris ŝi. Estas la volo de la dioj. Iru kaj portu ĉi tiun mesaĝon al via majstro Pluŝal.

Pluŝal koleriĝis sed kompreneble tio ne helpis. Li estis senkonsila. Kiam li finfine konsultis la estraron de saĝuloj, tiuj ĉi maljunaj aŭtoritatuloj jesis signifoplene per la kapo kaj unu el ili diris:

- Estis tiel ĉi jam dum jarmiloj kaj estos tiel ĉi dum jarmiloj, Pluŝal. La deziroj de tiuj, kiuj eniros la morton kun la faraono, estas devigaj. Estas la deziro de la dioj.

Pluŝal suspiris, foriris kaj diris al la atendantaj gardistoj:

- Estu tiel ĉi. Zorgu pri la plenumo de ŝia deziro.

La gardistoj, siavice, reiris al ĉe Eiristitis. Ilia ĉefo parolis:

- Via deziro estas deviga, Eiristitis. La lastan nokton vi rajtas esti kune kun Ammon, la mortkondamnito. La saĝuloj diris: Estas la volo de la dioj. Estu tiel ĉi.

Eiristitis kapjesis, ŝi ne ridetis. Neniam ŝia vizaĝo estis tiel serioza. Ŝi diris:

- Efektive, estas la volo de la dioj. Ornamu tiun ĉi turĉambron per floroj kaj surŝprucu la liton per bonodora parfumo de ruĝaj rozoj. Sur la planko mi volas peltojn de leonoj kaj tigroj, sed ankaŭ de gazeloj kaj antilopoj, la bestoj plej karaj al mi. Portu al mi delikatajn manĝaĵojn kaj la plej bonajn vinojn ĉar la lastan nokton de mia surtera vivo mi volas esti gaja. Mi volas pasigi ĝin en la plej bona etoso kun li, kiu pro amo je mi volis eniri la morton.

Kaj tiel oni faris ĉar estis la volo de la dioj. Pluraj gardistoj estis tre okupitaj kaj post kelkaj horoj, la ĉambro estis ne plu rekonebla. Kia lukso kaj kia brilo, al faraono povus esti pli riĉeca, sed ne pli bela.

La humuro de Pluŝal estis tute renversita. Estis al li honoro mem zorgi pri la gvidado de la taskoj. Li rimarkigis sin en la ĉambro plurajn fojojn. Liaj haroj kaj vizaĝo estis ekstreme bone aranĝitaj kaj li portis multekostan

blankan robon kun oraj borderaĵoj. Silente esperis tiu maljunulo, en la lasta momento, eble delogi la belulinon Eiristitis? Eble tiu lasta nokto povus fariĝi lia. Estas en la historio konate ke maljunaj, influhavaj viroj ofte kovas je folaj revoj, kiujn ili ekkredas firme. Tiel ĉi ankaŭ statis Pluŝal.

Ĉio estis preta. La suno komencis subiri, la vespero estis alveninta. La servistoj retiris sin en malgrandaj grupetoj, la manoj plenaj je iloj kaj restaĵoj de materialoj. Pluŝal mem ankoraŭ lastan fojon eniris. En li vivis kiel fajro la lasta espero.

- Ĉu estas bone tiel ĉi, Eiristitis?

- Tiel ĉi estas bone, sinjoro. Pli ol bone. Kiel mi povas danki vin...?

- Ĉu mi eksidu momenton, Eiristitis?

- Ne, mi bedaŭras, sinjoro, sed la nokto alvenas, la tempo ekurĝas. Estas nia lasta nokto, neniun momenton de ĝi ni perdu. Mi bedaŭras, sinjoro.

La maljuna Pluŝal suspiris. Li vidis sian revon forvaporigi.

- Nu do mi iru. Ĉu mi lumigu la lustron?

- Jes, sinjoro, faru por mi. Kaj poste sendu al mi Ammon, mia amato.

La vizaĝo de Pluŝal sombrigis, aŭdinte tiun nomon. Sed li sinregis. Estis la volo de la dioj. Hasteme li lumigis la lampon. Poste li klinis sin. Nun, estanta ankoraŭ malebria, li povis kompreni iom de la sentoj de tiu ĉi juna virino. Ankaŭ li iam estis juna kaj enamiĝinta.

- Kiel tiu viro aperu antaŭ vin, Eiristitis?

- Sendu lin baldaŭ. Sendu lin al mi tia kiel li sidas en la karcero, nur

vestita per sia bruna mantelo. Mi mem ja vestos kaj ornamos lin. Mi zorgos pri li kun amo, mi havas sufiĉe da tempo.

Estis lumo super la lito kaj estis lampoj ĉe la muroj. Dum Pluŝal suspirante forlasis la ĉambron kaj fermis la pordon, Eiristitis iris ĉe la fenestron. Ŝi vidis, por la lasta fojo, la sunon subiri malantaŭ la montetoj transe de la rivero. Malpezaj, multkoloraj nuboj ŝvebis super la akvosurfaco kaj aliaj nuboj ŝvebis ege pli alte, inter ĉielo kaj tero. Kiom bela tio estis! Kial ĝuste hodiaŭ la sunsubiro estu tiom bela?

- Estas la lasta fojo ke mi vidas vin, suspiris Eiristitis. Ŝi restis staranta ankoraŭ iom da tempo, revanta. La suno estis for. Tiam, oni frapis la pordon.

- Ŝi kuris al la pordo kaj malfermis ĝin. Tie staris Ammon antaŭ ŝi, en la kruda, juta mantelo. Li aspektis malpura kaj liaj haroj estis taŭzitaĵ. Sed Eiristitis vidis nur liajn okulojn, liajn grandajn, sopirantajn okulojn.

- Estu bonvena, sinjoro, diris ŝi, estu bonvena.

- Kiel mi povas danki vin, sinjorino, respondis la juna viro. Mi eĉ ne povis esperi revidi vin. Mi...

- Ne, mi devas danki vin, sinjoro. Vi ja estas Ammon?

- Jes, estas mi. Nomu min Ammon.

- Kaj mi estas Eiristitis. Nomu min Eiristitis, Ammon, mia kara Ammon kiu volis oferi sian vivon por mi. Ho, Ammon.

Kaj ŝi alpaŝis lin kaj kisis lin. Kaj Ammon brakumis ŝin.

- Ammon, mia amato, flustris ŝi. Mia amato.

Tiuj ĉi kelkaj karaj vortoj briligis la okulojn de Ammon. Estis kvazaŭ li estis levita for de la tero kaj alvenis en alia mondo. Ĉio kio sekvis pasis kvazaŭ en sonĝo sed li sciis kaj sentis ke tamen estis la realo.

- Eiristitis, mia karulino, diris li mallaŭte, ekde la unua fojo ke mi vidis vin, mi amadas vin.

- Ankaŭ mi, Ammon, ankaŭ mi. Venu, venu proksimen al ĉe mi.

Tiam ili nenion plu diris ĉar iliaj buŝoj interkisis, ĉiam pli impete kun preskaŭ avida deziro.

- Venu, Eiristitis, mia amatino, venu. Li prenis la junan virinon pli forte en siaj brakoj kaj levis ŝin. Ŝi estis al li malpeza kiel plumo; li portis ŝin al la granda lito, kiu staris meze en la ĉambro.

- Ni ne perdu tempon, karulino.

Sed Eiristitis ridetis kaj skuis la kapon. Ŝi kisis lin amplene sur la vangon.

- La tempo ne urĝas, ni havas la tutan nokton por ni, Ammon.

- La tutan nokton? miris li.

- Jes, la tutan nokton, estis mia lasta deziro. Kaj la deziro de tiuj, kiuj eniros la tombejon kun la faraono, estas sankta, vi ja scias tion. La tuta nokto sola kun vi, mia karulo. Ni do ne hastu. Venu.

Ammon remetis la virinon kaj ŝi prenis lin ĉe la mano. Kiom bela ŝi estis. Ŝi portis longan, ruĝan robon de malpeza silko, kiu pendis ĝis la maleoloj. Dum ŝi promenis, konturiĝis la kurbaĵoj de ŝiaj mamoj. Tio memorigis Ammon al la robo kiun li mem estis portanta antaŭe. Ankaŭ ĝi estis silka, sed tiu ĉi estis skarlate ruĝa kaj pli bele fasonita.

Dekstre estis pordo. Ammon aŭdis akvon flui. Kiam ili venis pli proksimen, la juna viro rimarkis bonegan lavendo-odoron.

Eiristitis turnis sin al sia amato.

- Tio estas la banĉambro, Ammon. Vi povas bani tie.

- Ĉu mi sola?...

Ŝi ridetis.

- Ne, kara. Mi iros kun vi kaj lavos vin. Poste mi ŝmiros vian korpon per parfumakvo. Mi kombos al vi la harojn kaj glatigos la haretojn de viaj okuloj. Mi volas vin bela antaŭ ol la nokto komenciĝas, mia kara Ammon, mia plej kara fianĉo.

Fianĉo? Tio ja mirigis Ammon iomete.

- Fianĉo? ripetis li. Ĉu vi volas?

- Jes, mi volas, kapsignis ŝi. Ĉu vi volas?

- Ho, Eiristitis! Mia kara, plejkara Eiristitis. Kiel mi ne volu tion? Estas mia plej kara deziro.

- Venu do, diris ŝi, ĉi-nokte ni celebru geedziĝan feston.

- Ŝi malnodis la silkan ŝnuron kiu tenis sian robon ĉirkaŭ la kolo kaj momenteton poste ĝi falis sur la plankon. Ammon pro agrabla miro retiris la spiron, neniam li estis vidinta tian belan virinon. Ŝi havis gracian irmanieron kaj ĉe ĉiu movo, la koksoj luliĝis. Ŝiaj lumboj estis mallarĝaj kaj tre sveltaj sed tamen ŝi havis firmajn, pirformajn mamojn kun grandaj, malhelaj cicoj kiel maturaj rosinoj. Ĉu ili estis malmolaj kaj grandaj pro

deziro aŭ ĉu ili estis ĉiam tiaj?

- Venu, Ammon, flustris ŝi kaj ŝi aliris lin. Via bano estas preta, la akvo atendas.

Nun ŝi estis tuj proksima ĉe li, ŝi etendis la brakojn kaj malligis la zonon, kiu tenis la krudan, brunan robon. Ĝi glitis laŭ liaj lumboj ĝis la planko.

Ammon rapide turnis sin. Kial li hontis? Li metis ambaŭ siajn manojn antaŭ sian viraĵon.

Tio ridigis Eiristitis.

- Kial honti antaŭ mi, Ammon, ĉi tiun nokton ni ja estas fianĉo kaj fianĉino? Ŝi turnis sin kune kun li, malforte fortiris liajn manojn kaj karesis lin.

- Ne, bonvolu, ankoraŭ ne. Vidu kiom malpura mi estas ankoraŭ, mi malpurigus vin, kara.

Li reprenis kuraĝon, faris paŝon flanken kaj eniris la banujon. La akvo estis agrable varmeta. Kiam li ekkuŝis surdorse, lia obelisko staris grande kaj fortike sur la akvo.

Eiristitis ridis. Ammon denove ruĝiĝis pro honto kaj turnis sin rapide.

- Nu, Ammon, mi helpos vin.

Kiam la juna viro levis sian vizaĝon al ŝi, li rigardis serioze. Estis malgaja mieno en liaj okuloj. Pri kio li pensis?

- Nur unu vespero, suspiris li, unu vespero.

- Unu nokto, karulo, unu tuta nokto, longa nokto. Kaj mi zorgos pri tio ke ili ne ĵetos vin en la fajron, mi volas revidi vin en la postmorta mondo,

Ammon, eterne. Mi savos vin.

Tio mirigis la viron.

- Savi min? demandis li. Savi min de fajromorto, tiel ke mi povu vivi ankaŭ postmorte? Kiel, kara?

- Tio estas mia bela sekreto, Ammon. Poste mi rakontos al vi. Poste, antaŭ tio ni havas multan tempon.

Ŝi eliris la banejon kaj revenis kelkajn momentojn poste kun du malgrandaj travideblaj pokaletoj kun helverda likvaĵo.

- Jen, diris ŝi, trinku tion ĉi, ĝi varmigis vin kaj forpelos ĉiujn malagrablajn pensojn.

- Sed...

- Faru kion mi diras, kara, plie ĝi grandigas la malsaton. Venu, rektigu vin.

Li obeis ridetante. Li prenis la pokaleton en la dekstran manon.

- Trinku Ammon, fintrinku ĝin.

- Per unu gluto?

- Jes, per unu gluto, signis ŝi. Jen... kaj ŝi mem metis la pokaleton al sia buŝo kaj malplenigis ĝin.

Ammon sekvis ŝian ekzemplon. La substanco bruligis liajn langon kaj palaton.

- Ho, kiom forte, diris li. Kaj li rigardis supren al sia amatino, kiu staris nuda antaŭ li apud la banujo.

- Mi nun lavos vin, Ammon, diris ŝi. Ŝia voĉo sonis alie, ŝia voĉo estis felpa. Ĉu pro tiu ĉi trinkaĵo?

Ŝi metis unu gambon en la banujon. Ammon vidis ŝiajn molajn femurojn kaj ŝian malhelan sinon kaj denove li ekbrulis pro deziro kaj lia lanco

streĉe grandiĝis. Li devis reteni sin por ne ekstari salte.

Li etendis siajn manojn kaj karesis ŝiajn genuojn kaj femurojn. Kiam li suprenrigardis al ŝi, li rimarkis ke la cicoj de ŝiaj mamoj fariĝis pli grandaj kaj malmolaj, belaj, karaj cicoj, kiuj eliris iliajn kuŝejojn kaj plenkreskis: malhele brunaj burĝonoj de du malhelaj floroj.

Li daŭre karesis la internan flankon de ŝiaj gamboj, de la kalkanoj ĝis proksime al la fonto. Tre milde, per la dorso de sia dekstra mano.

- Trankvile, kara, unue mi lavu vin.

- Jes, kara.

Li prenis sapon kaj lavis al si la brakojn. Ŝi ekstaris malantaŭ lin, nun kun ambaŭ gamboj en la akvo, ankaŭ prenis sapon kaj komencis per siaj de sapo ŝaŭmaj manoj ŝmiri lian korpon, unue lian kolon kaj liajn ŝultrojn, poste lian dorson kaj denove la ŝultrojn. En tiu momento ŝi ekstaris tiom proksima de li ke ŝia korpo tuŝis lian. Li sentis la varmegon de ŝia sino kaj la tikladon de la pubharetoj kontraŭ lia maldekstra ŝultro. Ŝi havis molan sinon.

Intertempe ŝi estis komencinta ludi per siaj facilmovaj fingroj en lia vizaĝo, lasante nur liajn okulojn kaj buŝon netuŝitaj. Poste ŝiaj manoj subeniris laŭ lia kolo ĝis la brusto kaj pli suben ĝis la umbiliko.

- Ho kara, kara, flustris li kaj puŝis sian ŝultron pli firme kontraŭ la avida sino. Ŝi ne plu rezistis.

- Ekstaru, Ammon, ekstaru rekte momenteton, diris ŝi. Rapide.

Estis kvazaŭ ŝi mem hastis por finfari. Per la manoj li serĉis subtenon sur la randojn de la bankuvo kaj ekstaris, kun la dorso al ŝi. La virino klinis sin, prenis abunde da sapo kaj komencis ŝmiri al li la gambojn, genuojn

kaj femurojn.

- Turnu vin, kara.
- Ne, ankoraŭ ne, faru tiel ĉi, Eiristitis.
- Sed, Ammon.
- Faru tiel ĉi, kara.
- Bone.

Ŝi surgenuiĝis kaj metis siajn manojn antaŭen por atingi pli bone la internan flankon de liaj femuroj. Ŝi komencis ŝmiri ilin. Ĉu ja estis ŝmiri? Ŝi karesis lin per mola mano. Kaj ĉiam pli alten.

- Haltu, Eiristitis, atendu. Mi faros la reston mem.
- Ne, kara, ne. Lasu min fari, flustris ŝi. Ŝiaj manoj estis unu granda ŝaŭmaĵo. Ŝia dekstra mano iris de antaŭe, la maldekstra ĝentile vringis sin tra inter la du femuroj.

Iom poste, saketo kaj bukloharoj estis blankaj de ŝaŭmo. La lanco de vireco lasis sin ŝmiriĝi obeeme sed kreskis impete el la ŝaŭmo. Pli malmole kaj pli rekte ne eblis.

Ammon suspiris.

- Ĉesu tion, kara, bonvole. Li tiris sin libera el ŝiaj manoj kaj turnis sin. Ŝi serĉis ĉe li subteno kaj rektigis sin.

Ili falis unu en la brakojn de la alia kaj puŝegis la korpojn unu kontraŭ la alia. Liaj lipoj serĉis ŝiajn.

- Eiristitis, kara.

- Ho, Ammon, diris ŝi. Ho, Ammon.

Ŝi elpaŝis la banujon dum li lasis sin fali en la akvon por forlavi la sapon.

- Ĉu mi sekigu vin?

Sed li estis jam el la banujo kaj denove brakumanta ŝin. Ili eliris la banejon sed ne iris ĝis la lito. Eiristitis vringis sin libera kaj lasis sin fali sur la dorson, sur la molan pelton de antilopo. Ŝi kuŝis tie invite kun la genuoj iom levitaj, la brakoj kaj gamboj etenditaj.

- Ho, kara karulo.

Ammon lasis sin faleti sur la genuojn inter ŝiaj gamboj kaj kuŝigis sin milde sur ŝin sed ĉio de li estis malmola de vireco. Tiam li singarde eniris en ŝin kaj el liaj okuloj radiis la tenerecon de la amo al la virino por kiu li estis preta oferi sian vivon. Lia tuta korpo tremis pro sovaĝa dezirego sed tamen, sinregante, li eniris ĝentile kaj singarde en ŝian virinaĵon. Mola kaj tamen profunda, senfine profunda.

- Ĉu ne doloras, kara?

- Ho Ammon, kara karulo, ĝemis ŝi beate kaj ŝi kisis lin per malseka, varma buŝo. Kiom rave bonege estas, senti viron profunde en si, viron kiun vi amegas.

- Ĉu vi vere amas min?

- Jes, kara kaj vi scias.

Ŝi estis tiom mola kaj malseka ke li kvazaŭ aŭtomate enŝoviĝis. Pli profunden li ne plu povis. Li komencis movi sin maldekstren kaj dekstren, pli kaj pli impeta. Li anhelis.

- Trankvile, malrapide kara, lasu daŭri longe, Ammon, flustris ŝi.

Sed sammomente ŝi sentis ke la konsilo estis tute senutila, ke ĝi estis tro malfrua. Ammon subite penetris forte kaj grande kaj malmole en ŝi, lia tuta korpo estis varma kaj ardanta. Li enspiris kaj lia obelisko ekfajris. Estis kiel giganta ĵeto de grandonda fonto. Kaj pli kaj pli kaj pli, rapide kaj impete unu post la alia.

Eiristitis estis ferminta la okulojn kaj instinkte la malgrandaj muskoletoj, alte je la internaj flankoj de ŝiaj femuroj, komencis moviĝi ritme. Kaj ankaŭ aliaj muskoletoj kunludis. Ammon sentis la suĉadon de ŝia varmega sino.

Li anhelis, ŝi anhelis, estis unu beata anhelado. Ammon ŝvitis abunde. Li profunde enspiris: liaj gluteomuskoloj kuntiriĝis kaj li lastan fojon forte kaj profunde eniris ŝin.

- Ho kara, milda virino.

- Ho dolĉa, forta Ammon.

Ŝi malfermis la okulojn kaj rigardis en liajn. Iliaj okuloj nun estis tre proksimaj unuj al la aliaj, iliaj okuloj estis grandaj kaj molaj de amo. Momente Ammon kuŝis pli peze sur Eiristitis.

- Ĉu mi ne pezas tro, kara?

Ŝi ne respondis, ŝi kisis lin.

- Ĉu mi retiru min?

Sed ŝi metis siajn brakojn firme ĉirkaŭ lian kolon.

- Ne, kara, restu. Restu ankoraŭ iom, estas tiom bone senti vian karnon en mi. Vian ravan, varmegan, molan karnon.

- Al tiu ĉi momento mi multajn tagojn sopiris, Eiristitis. Ekde la unua fojo ke mi vidis vin.

- Tiel estis ankaŭ ĉe mi, Ammon. Mi sopiris la tagon dum kiu mi estus kune kun vi.

- Ho, plej kara karulino. Nun ...

- Jes, Ammon?

- Nun ni estas edzo kaj edzino.

- Jes, nun ni estas edzo kaj edzino, ripetis ŝi. Vere, mi sentis vin. Estis rave.

Ŝi kisis lin denove sur la buŝon kaj mallonge ŝi tuŝis per la pinto de sia lango lian. Tio denove estigis lin en ekstazon.

- Mi sentas vin, Ammon, mi sentas vin ...

- Kion vi diras?

- Mi sentas vin grandiĝi denove, Ammon. Ĉu ne?

Sed li ne respondis. Li denove metis siajn manojn sub ŝiajn skapolojn. Liaj femuraj muskoloj ekmoviĝis kaj samtempe li sentis ke ŝia sino refoje malfermis sin, pli mola, pli granda, pli avida. Eiristitis ĝemis; ŝi kaptis Ammon per ambaŭ ŝiaj manoj ĉe la koksoj kaj puŝis lin pli forte kontraŭ sin.

- Pli profunde... pli profunde, Ammon, ... pli profunde, suspiris ŝi. Venu pli profunde en min. Jen, jes, tiel ĉi estas bone.

Kaj li sentis je sia propra korpo ke ĝi denove fariĝis granda kaj rigida kaj kiel en ŝia korpo estiĝis ritma movado kiu karesis lian faluson, de supre suben kaj de sube supren, premanta kaj samtempe suĉanta movado.

Ammon denove komencis anheli kaj refoje ekŝvitis dum la virino sub li, kiu nun estis lia edzino, ne plu povis regi siajn movojn. Kaj kiam li duan fojon priradiis ŝin per sia semo, ŝi komencis moviĝi tiom impete kaj skue ke li sentis ke ankaŭ ŝi estis plene kontentiĝanta. Ankaŭ ŝia orgasmo estis perfekta.

Ambaŭ ili baniĝis en ŝvito. Ili rigardis unu la alian per feliĉaj okuloj plenaj je beateco.

- Ho, Ammon...

- Ho, Eiristitis, mia amatino. Kaj li metis sian kapon en la faldon de ŝia varma kolo, lian dekstran manon protektante sur ŝian maldekstran mamon. Per siaj polekso kaj montrofigro li volis karesi la cicon, sed ŝi ĝentile prenis lian manon en ŝian manon.

- Ne nun, kara, ne nun. Poste, diris ŝi, poste. Ni ripozu iom.

- Ĉu mi ekstaru, Eiristitis?

- Ne, iom restu kuŝanta plu. Tiel ĉi estas beate, karulo.

Kaj li restis kuŝanta, kun sia dekstra mano sur ŝia maldekstra mammo, sen tuŝi ŝian cicon. Li sentis la batadon de sia koro malrapidiĝi kaj la faluson malgrandiĝi, en mallongaj, tiraj movoj kaj ankaŭ la virino sentis tion ĉi. Ŝi provis teni la juvelon per siaj vulvoj sed ili estis tro malsekaj de lia kaj ŝia fluidaĵoj. Malrapide li forglitis el ŝi, daŭre fariĝanta pli malgranda kaj mola, ĝis plena senkulpeco.

- Ĉu mi?...

- Ne, restu dum ankoraŭ iom da tempo sur mi, kara. Vi estas tiom mola kaj varma kaj mi estis atendanta vin dum tiom da monatoj. Kaj ŝi kisis lin denove per ŝiaj avidaj lipoj.

Li levis la kapon de sur ŝia kolo kaj, kurbante la dorson, movis ĝin suben. Ŝia dekstra mammo tie kuŝis kiel matura, roza frukto kun malhele bruna cirklo kaj endormiĝinta cico. Kvazaŭ matura, malhela sekiĝinta bero, tre deloge dolĉa.

Li ŝovis siajn lipojn sur la montetan deklivon ĝis la pinto. Sed ŝi milde repuŝis lian deziron.

- Ne nun, Ammon, plej kara. Vi ja malsatas, ĉu ne?

Li kapjesis dum li forŝovis sin de ŝia korpo al sur sia maldekstra flanko.

- Venu, Ammon.

Ili ekstaris kaj denove kisis unu la alian.

- Mi sekigu vin, vi estas malseka de ŝvito. Poste ni iom manĝu.

Li trovis tion bona, li trovis ĉion kion ŝi diris kaj proponis bona.

Kiam ili promenis preter la malfermita fenestro, Ammon senintence rigardis eksteren. Intertempe jam tute mallumiĝis. Li vidis la altan, egiptan ĉielon kun ĝiaj mil steloj. En oriento, super la dezerto, troviĝis spuro da heleco. Baldaŭ malfrua luno aperos.

Ili unue kuŝigis sin en la banujon por forlavi la ŝviton de siaj korpoj. La akvo intertempe estis jam malplivarmiĝinta. En akvopelvo ili lavis al si la organojn.

- Venu, por ke mi sekigu vin, Ammon.

- Kaj mi vin, proponis li.

Dum ŝi viŝsekigis lin, li karesis per sekigtuko ŝiajn mamojn kaj ankaŭ ŝian sinon. Lia faluso denove montris spurojn de vivo, kiam la mola virinmano sekigis lin per la tuko.

- Ho, kara karulino.

- Unue ni iom manĝu, ripetis ŝi.

Ŝi ŝovis sian ruĝan robon laŭ la kapo suben. Ĝi falis kun vastaj faldoj ĉirkaŭ ŝian korpon, dum ŝi fikse tiris la silkan ŝnureton ĉirkaŭ la kolo.

Por Ammon ŝi estis alportiginta puran robon. Ĝi estis hajloblanka. Li fikse ligis ĝin per la ŝnuro ĉirkaŭ la lumboj. Poste ili iris, manon en mano, al la ĉambro kie la tablo estis pretigita. Abundo da manĝaĵoj kun en la mezo, dekstre kaj maldekstre abundo da odorplenaj floroj.

- Kiom bele, Eiristitis.

- Por tiu ĉi nokto nenio estas sufiĉe bela, mia kara novedzo.

Troviĝis diversaj, malvarmaj pladoj, ornamitaj de kompetentaj manoj. Estis blanka kaj ruĝa vinoj. La blanka vino staris en grandaj, poraj pokaloj, plenigitaj per akvo. En tio, la akvo ĉiam restis freŝa ĉar parto de la akvo eniris la poran vandon kaj dank' al la rapida vaporigo certigis daŭran malplivarmigon.

Granda diverseco de fruktoj ankaŭ troviĝis, ili en grandaj, travideblaj bovloj provizis koloron. Staris unu sidilo maldekstre kaj unu sidilo dekstre. Ammon kunmetis la du.

- Ĉiun momenton de ĉi tiu nokto mi volas esti proksima ĉe vi, karulino.
- Longa, rava nokto, flustris Eiristitis kaj ŝi ridetis.

Unue ili prenis kelkajn malgrandajn pecojn de fiŝo, kun kio la seka, blanka vino gustis bonege. La abunda transpirado dum la amorado estis soifiginta ilin.

Post la fiŝaĵo, ili prenis pecojn de malvarma birdaĵo, kio kuŝis sur arĝentaj pladoj. Kun tio taŭgis la malhela, ruĝa vino. Ĉio estis bongustega. La okuloj de la du geamantoj komencis brili. La ruĝa vino metis en iliajn okulojn ruĝan ardon.

- Ĉu ni ankaŭ manĝu de la fruktoj, kara? demandis Eiristitis. Aŭ ĉu ni ripozu iom unue?

- Ni ripozu, kapjesis li.

Ili ekstaris kaj dum ili interkisis, ili malfiksis siajn robojn. Nudaj ili kuŝis unu apud la alia sur la mola, lanuga lito.

Ammon metis la maldekstran manon sur la flankojn de ŝia dekstra monteto kaj liaj fingroj pretiĝis por karesi la dormantan cicon. Ŝia mano serĉis lian malsekan umbilikon por iri pli suben.

Kiam ŝi karesis lian faluson, Ammon duone rektigis sin kaj metis sian

buŝon al ŝia mamu. Li lekis per la pinto de sia lango la molan kernon kiu preskaŭ tuj fariĝis granda kaj malmola.

- Ho, Ammon.

Ankaŭ li sentis sin fortiĝi denove. Li kisis ŝian umbilikon kaj la molan kurbaĵon de ŝia ventro dum ŝi komencis karesi lian kreskantan obeliskon pli kaj pli rapide per la fingroj de ambaŭ manoj.

- Ho, kara...

Ŝi karesis ambaŭmane liajn femurojn. Kaj antaŭ ol unu el ili konsciis, li kuŝis vid-al-vide de ŝia malhela sino. Ŝi denove ekkaresis lian viraĵon kun kreskanta impeto.

Ammon fariĝis tiom plena je deziro ke li tiris ŝian korpon pli proksimen ĉe si. La momenton poste li kuŝis kun lia kapo en ŝia sino, kies femuroj invite malfermiĝis. Inter la bukiantaj haroj de la malhela arbusteto, li vidis la movojn de la malvasta, malsekiĝanta fonto.

Kaj sube en sia korpo li sentis la ludadon de la fajnaj fingroj de sia amatino kun liaj pezaj juveloj. Kaj tiam, subite, ĉirkaŭ la ruĝa glano, malseka, varmega premanta kapto.

Ammon surpriziĝis. Li singarde liberigis sian kapon el la kapto de ŝiaj femuroj kaj rigardis suben. Inter la valo de du mamoj, kiuj staris nun forte cicitaj, li vidis ŝian karesantan buŝon.

- Eiristitis, mia kara...

Ŝi lasis la objekton de ŝia deziro mallonge kaj diris:

- Ĉu ne estas bone, plej kara?

- Certe, die ... sed ...

- Ni ja estas viro kaj virino, Ammon. Ni rajtas fari ankaŭ la preludon. Ni ankoraŭ havas tre longan nokton...

Kaj kiam ŝi daŭrigis karesi lian korpon per varmegaj, antaŭenmetitaj lipoj, li denove sentis suĉantan varmon.

Kaj poste la ludadon de rapida, turniĝanta lango. Refoje li vidis ŝian malfermantan ruĝan fonton kun ombro de travidebla muko de virina deziro. Kaj la femuroj kiuj invite sin plimalfermis.

Per la fingroj de ambaŭ manoj la novedzo komencis karesi la valon, milde kaj singarde inter la supra femuro kaj la malhela, arbusta monteto. Poste li per sia lango malsekigis siajn tro sekajn lipojn kaj kisis ŝin.

Eiristitis ne plu povis kuŝi senmova. Ŝi ĝemetis kaj puŝis lian kapon ambaŭmane pli firme kontraŭ sian sinon ĝis kiam li per sia lango penetris pli profunde en ŝin por karesi la vandojn de la kara groto. De tio ŝi fariĝis tiom ekscitita ke ŝi lasis la brulantan karnon kaj ekanhelis pro ĝuo. Kaj ĝuste je la momento kiam ŝi skue atingis orgasmon, lia tremanta lanco fariĝis flamanta fontano de fajro. Ŝi trinkis lian subliman fluidaĵon. Neniam ŝi estis gustinta viran semon.

- Ho... Ammon...

- Ho... Eiristitis, mia plej kara karulino.

Ŝi malstreĉiĝis kaj malfermis la krurojn, ripozantaj sur la lito. Tiel faris ankaŭ la viro. Abunde ŝvitantaj kaj de la ludado lacaj, ili restis unu apud kaj sur la alia, kun la kapoj en la sino de la alia. Kaj estis bone. Ili kun beata sento fermis la okulojn.

Kiom longe ili kuŝis tiel? Duonhoron? Unu horon? Ĉu ili dormis? Kiam ili denove malfermis la okulojn, la luno estis jam super la montetoj.

Ammon levis la kapon kaj turnis sian korpon. Li rigardis en la brilajn okulojn de sia amatino.

Ŝi turnis sin surdorsen, kun la gamboj malfermitaj kaj la brakoj super la kapo, sed daŭre tenanta la kapon klinita por povi daŭre rigardi Ammon.

Per la lango ŝi lekis laŭ siaj lipoj. Ili estis sekaj. Ankaŭ Ammon malsekigis siajn lipojn.

- Via buŝo estas seka, kara, diris Eiristitis. Ĉu vi ne soifas? Mi soifas.

- Ankaŭ mi, Eiristitis.

- Mi portos al vi iom por trinki.

- Ne, mi faros.

Ili samtempe rektigis sin kaj glitis el la lito. La cicoj de la virino estis retiriĝintaj. Ŝi rigardis la faluson de sia edzo. Ŝi nun trovis ĝin aminda, delikata aĵeto kun kalma, preskaŭ angula kapo, tre malgranda kaj sulketa sed tamen aminda. Ŝin ekposedis la deziro karesi ĝin ĝentile, sed ŝi retenis sin.

La du geamantoj prenis la reciprokajn manojn kaj iris al la tablo. Ili trinkis el la pora kruĉo. La akvo estis freŝa.

- Kion vi pensas, Ammon? Ĉu ni ankoraŭ manĝu iom da fruktoj?

Li kapsignis.

- Aŭ ĉu vi preferas manĝi plian pecon da viando unue?

Li kapsignis denove.

Ili manĝis pecojn de malvarma birdaĵo kaj poste suĉis la sukon el kelkaj citrusfruktoj. En bovloj ankaŭ troviĝis maturaj, brilaj daktiloj, molaj marakuzoj kaj malhelaj vinberoj.

La fruktoj estis dolĉaj, sukoplenaj kaj bongustegis.

Estis ankaŭ freŝaj ovoĵoj de diversaj akvobirdoj. Eiristitis enpikis per pinglo du truetojn kaj ofertis ĝin al sia amato. Ammon suĉis kvar malgrandajn ovojn malplenaj.

Kiel fino ambaŭ ili trinkis ankoraŭ po unu pokalon da blanka vino. Poste ili denove prenis la manojn reciproke kaj reiris al la lito. Tie ili ripozis trankvile, unu apud la alia, la gamboj kaj brakoj disetenditaj.

Eiristitis estis mallonge reekstarinta por estingi la lumojn, sed tute ne estis mallume. Tra la malfermita fenestro ili vidis la plenlunon. Ĝi altiĝis malrapide al sia zenito.

Kiom longe ili tiel kuŝis? Kiom longe ili rigardis la lunon kun ĝiaj mallumaj, misteraj makuloj? Ĉu la luno estis la granda okulo de la bona dio, kiu

gardis la nuptan nokton de du junaj geamantoj?

- Ho, kara Dio, gardu nin kaj zorgu ke ne finiĝu tiu unu, bela nokto.

Preskaŭ en la sama momento, Ammon kaj Eiristitis rektigis sin. Iliaj manoj serĉis unu la alian kaj ili kisis la buŝon unu de la alia. Ammon demandis sin ĉu li denove dormis. Li sentis sin denove forta. Li volis subenpuŝi Eiristitis kaj ŝovi sian korpon sur ŝian sed ŝi ridante retenis lin.

- Poste, kara. Mi ankoraŭ ne dancis por vi.

Kaj iom poste:

- Ne, mi ankoraŭ ne dancis por vi, kara mia.

- Dancu do por mi, edzino. Kaj invite li eksidis rekte. Ĉu vi povas danci sen muziko?

- Dum mi dancos, mi kantos por vi, Ammon.

Ŝi iris al seĝo, prenis robon kiun ŝi surmetis de sur la kapo. Poste ŝi vestis sin per dua robo kiu atingis la plankon. Ŝi ankaŭ lumigis du lampojn, elradiantajn blankan lumon, tiel ke kun la arĝenta luno ili formis tri lumfontojn.

Dank' al tiu ĉi lumo Ammon rimarkis ke ankaŭ tiu ĉi supra robo estis ruĝa.

Eiristitis eksidis meze en la ĉambro sur la plankon kaj atendis. Ankaŭ Ammon atendis, tre streĉita kaj scivola pri tio kio sekvos.

Post longa tempo de silento, li ekrimarkis mildan murmurkanton kaj samtempe li vidis kiel la dancistino malrapide levis la kapon kaj ekstaris per lulanta movado. Alten ŝi leviĝis sur la sveltaj gamboj, kun la manoj svingantaj kaj streĉitaj super la kapo. Poste ŝi turnis sin malrapide per

gracia movo, tiel ke la ruĝa robo kiel liber mova ventumilo malfermiĝis.
Kaj per varma, malalta voĉo, la juna virino ekkantis.

‘Mi dankas vin, bonaj dioj,

pro tiu ĉi nokto.

Mi dankas vin pro tio

ke mi fine trovis mian edzon.

Benita estu via nomo

tra la tuta etero.’

Poste ŝi silentis mallonge sed daŭre dancadis gracie. Ĝis kiam ŝi rekomencis murmure kanteti. Ŝia voĉo nun estis pli alta kaj la ritmo de ŝiaj movoj pli vigla. Fariĝis alia kanto, pli juna, pli rapida. Kaj dum la dancistino venis pli proksimen ĉe Ammon, kiu estis eksidinta kelkajn paŝojn antaŭ la lito, ŝi malligis la ruĝan robon de ĉirkaŭ sia kolo, tiel ke ĝi malrapide laŭ ŝia korpo subenglitis. Ammon rimarkis ke la dua robo estis verda, sed de tre malpeza, travidebla ŝtofo, apenaŭ pli ol ia gazo, tiel ke li povis vidi tra la robo la belajn formojn de Eiristitis kaj la hastemajn movojn de la dancanta korpo, kiam la dancistino mallonge ŝovis inter li kaj unu el la lumfontoj.

Unu momenton, liaj okuloj estas fascinitaj per la konturoj de ŝiaj firmaj mamoj kun akre pintitaj cicoj, alian momenton per la malgranda, malluma spaco, alte inter la femuroj, ofte ankaŭ per la ritma movado de ŝiaj koksoj kaj sino.

La murmurado ankaŭ nun transiris al vera kantado, de kanto kun propra melodio, kanto kies vortojn ŝi mem verkis.

‘Ho, mia kara amato,

kiom ĝojas mia koro

ke vi venis

al ĉe mi.

Ho, mia amato,

oro el miaj revoj,

ne forlasu min.

Forlasu min neniam.

Rigardu en miajn okulojn

Rigardu per viaj oraj okuloj

en miajn okulojn

kaj faru ilin oraj,

sopiraj pro deziro.'

Ŝi nun ŝovis sin tre proksimen al ĉe li kaj, kvankam ŝiaj mamoj nun tre akre konturiĝis kaj li flari povis la varmegan deziron de ŝia sino, li rigardis nur ŝiajn okulojn, tiujn grandajn, brilajn okulojn.

Kiam li rektigis sin iomete, liaj lipoj tuŝis ŝiajn kaj li kisis ŝin. Sed kiam li volis kapti ŝin per ambaŭ manoj, ŝi lerte flankenfleksis la korpon kaj glite eskapis lian kapton.

Ammon estis nun duonstaranta. Li sidis sur unu genuo kaj pro fortega deziro li sentis kiel dolĉa doloro de deziro trafulmis sian erektitan obeliskon.

Kaj denove estis alia melodio, la kanto estis transirinta en nekompreneblan murmuradon. Malrapida, romantika melodio. La korpo de Eiristitis kunondis, ŝia tuta korpo, sed speciale ŝiaj mamoj kaj ŝia ventro moviĝis. Kaj subite ankaŭ la verda robo glitis de ŝi. Eiristitis estingis la lumojn kaj dancis nun nuda antaŭ ŝia amato.

Ŝia malhela, iom ŝvitkovrita korpo brilis en la arĝenta lumo de la plenluno.

La murmurado denove fariĝis kantado.

'Venu, mia amato,

mia dolĉa novedzo.

Venu en miajn brakojn

kaj dancu kun mi

la dancon de

la eterna amo

la dancon de novedzino

kaj novedzo.'

Ĉe la lastaj vortoj ŝi aliris lin kaj etendis al li siajn manojn. Ammon salte ekstaris kaj dum ili kune murmurkantis malnov-egiptan ammelodion, ili kiel du junaj diidoj ŝovis sin tra la duonluma ĉambro, iliaj nudaj, brilaj korpoj priludataj de nur la luna lumo.

Dum la dancado, Ammon forte ĉarmiĝis de la juna virina korpo, sed li provis sinregi; ankaŭ sinregado estas parto de la amludo. Per unu mano, li tenis la manon de Eiristitis kaj per la alia, li karesis ŝian kolon, la

longajn, nigrajn harojn aŭ ŝian velurecan dorson. Iam kaj tiam, dum la turnado, aŭ la antaŭenklinado, li mallonge tuŝis unu el ŝiaj femuroj per la pinto de sia lanco. Plejofte je la ekstera flanko, foje, kiam Eiristitis faris pli grandan paŝon flanken, je la pli mola interna flanko. Kaj unufoje, dum la malprofunda surgenuiĝo, li estis eĉ karesata de la tiklantaj bukloj de la ora pordego.

Malgraŭ sia sinregado, Ammon varmiĝis. Li cedis kaj provis proksimigi la korpon de sia edzino pli kaj pli. Sed ĉiam kiam li pensis sukceson, Eiristitis lerte turnis sin for. Ĝis finfine li ja sukcesis kaj ŝin prenis per dorsa kapto.

- Ho, Eiristitis, mia karulino.

Li ŝovis siajn brakojn sub ŝiajn tiel ke li povis kapti ŝin ĉe la mamojn. Lia obelisko, alte erektita, metis sin en la varmegan breĉon de la femurfendo.

- Ho, Ammon.

Per siaj manoj, ŝi puŝis liajn manojn pli forte kontraŭ sian bruston kaj kiam li per la molaj kusenetoj de polekso kaj ringofingro ekludis la cicojn, ŝi suspirante mallevis la brakojn kaj komencis serĉi pli sube, malantaŭ sia dorso, per la dekstra mano, lian ŝtalan viraĵon.

La murmurkanto estis jam dum iom da tempo ĉesinta kaj ankaŭ la danco. Ili ja ambaŭ ĝemadis unu je la spirito de la alia.

- Venu, Eiristitis.

Li klinis sin kaj prenis sian edzinon en la brakojn. Unu el ŝiaj femuroj forte - kaj tamen ankaŭ mole - premis kontraŭ liaj saketo kaj lanco.

Ammon metis Eiristitis mole sur la liton kaj eksidis transverse super ŝin sur siaj manoj kaj genuoj. Estis nur la lumo de la luno. Per siaj molaj manoj, ŝi karesis la saketon kun la molaj ŝtonetoj kaj per ŝiaj fingropintoj

ankaŭ la junton. Kaj la vergon. Milde, tre milde, apenaŭ tuŝante la junton. Kaj ĝuante, li lasis ŝin agi, preskaŭ sen movi sin.

Sed kiam ŝi ŝovis sin sur la lito pli suben ĝis kiam ŝia buŝo estis sub la ludilo kaj ŝi ankaŭ per ŝia varma, malseka lango ekludis la junton, li ne plu povis regi sin. Li plonĝis trans ŝin kaj ŝovis sin tutsterne apud ŝi. Hasteme li serĉis per sia buŝo sian fonton, profunde kaŝita sub la arbusteto de ŝia venusa monteto. Kaj per sia lulanta langopinto, li ekkaresis la molajn, tremetantajn lipetojn de ŝia plimalsekiĝanta virinaĵo.

Klare, Eiristitis ĝuis, ĉar ŝi turnis sin pli surdorsen kaj bonvenige malfermis siajn malhelajn femurojn. Samtempe ŝia lango ŝoviĝis laŭlonge de la junto supren kaj ĝi lekante trovis la jam tremantan obeliskon kiun ŝi per hastema hasto enbuŝigis kaj ĉirkaŭpremis per la lipoj.

Kaj laŭ la ritmo de lia frandzado, ŝi ekglitis per siaj lipoj ĉirkaŭ lia fluto, dum la langopinto premis la suban flankon en beata dolĉeco.

Nun daŭris pli longe ol la unua fojo, tiu ĉi antipodo-ludo.

Estis pli agrable, pli kare, pli milde, pli sinrege, ne plu tiom junece kaj tiom sovaĝe. Kaj antaŭ ol ŝi atingis novan orgasmon, Eiristitis lasis la aminstrumenton. Ankaŭ Ammon retiris sian langon el la amĝardeno kaj profunde enspiris. Kaj sen diri vorton ili turnis sin kaj metis sin pli proksimen unu kontraŭ la alia kaj interrigardis la okulojn.

La preludo estis ege ĝuinda. Iliaj buŝoj serĉis la alian kaj ili interkisis sin.

La ardo ne estis estingita. Eiristitis metis sin surdorsen kun la genuoj iom levitaj kaj la femuroj dise. Ammon surgenuiĝis inter ili kaj dum li alterne kisis ŝin kaj la rozburĝonojn de ŝiaj mamoj per malfermita buŝo, lia fonto venis daŭre pli proksimen ĉe ŝia.

Ŝi dekstramane karesis la rigidan lancon kaj poste la saketon kun la oraj

Ŝtonetoj dum ŝi per la maldekstra mano singarde forŝovis la prepucion de la glano.

Ammon suspiris, li streĉis siajn femurajn muskolojn kaj ekkuŝis sur ŝin. Kaj kiom ajn malmole li estis, li mole eniris profunde en ŝin.

- Mia plej kara karulino.

- Mia kara, dolĉa edzo.

Ili interkisis la lipojn kaj rigardis en la okulojn de la alia. Li metis siajn manojn sub ŝiajn ŝultrojn kaj ŝi metis la brakojn ĉirkaŭ lian kolon. Ili firme premis sin kontraŭ la alia kaj komencis moviĝi onde, suben kaj supren kaj supren kaj suben, sed ne tro intense, ja sinrege por plilongigi la dolĉecon de la kunesto.

Jes, Eiristitis ĝuis, ŝi sentis kiom profunde en ŝi la velura malmolo karesis ŝian virinaĵon. Kaj li siavice sentis suĉantan varmon moviĝi supren kaj suben la tutan tempon, daŭre ĉirkaŭ lia obelisko.

Ŝi mallonge lasis lian buŝon.

- Ĝi daŭre kreskas en mi, kara, mi sentas ĝin kreski. Ho, kiom agrable.

- Kaj vi ekbrulas, kara. Kia agrablega kunesto.

Kaj iom poste, preskaŭ samtempe, ili ekanhelis por trovi spiron. Ammon sentis kiel ŝia dolĉa suĉilo pli firme ĉirkaŭpremis lian ŝvelintan lancon, dum Eiristitis sentis pli da viveco kaj ŝveliĝo en sia fonto.

- Karesu min, karesu miajn montetojn, kara, anhelis ŝi. Prefere mian

maldekstran.

Kaj ŝi levis sian maldekstran brakon ĝis super la kapo tiel ke li per siaj lipoj povis atingi la cicon kiam li klinis la kapon antaŭen.

- Kisu min, kisu min, kara.

Kaj iom poste,

- Jes, tiel ĉi. Per viaj lipoj, jes tiel, leku per via lango. Ĉu mi premu vin?

- Jes, Eiristitis. Pli. Jes, pli.

Subite ŝi liberigis al si la mamon kaj ŝia buŝo denove serĉis lian. Ŝia lango ekludis sovaĝe en lia buŝo. Tio portis ankaŭ lin al ekstazo. Li puŝis sovaĝe kaj anhele en ŝi, mallonge sinsekve kaj lia obelisko denove transorĉiĝis al agrable radianta fontano, kiun ŝi anhele kaj suspire suĉis malplena en ardaĵ movoj.

Kaj li anhelis kaj ŝi anhelis. Ili ekŝvitis abunde kaj la skuaj movoj rapidiĝis, plirapidiĝis ĝis kiam la lanco finpafis kaj perdis volumenon, la premo en la fonto malmultiĝis... kaj la ritmo perdis ritmon por finfine stagni. Nur restis la beata suspirado.

Ammon sentis ke la fonto sub li estis plenigita per fluidaĵo kaj ŝi sentis kiel lia faluso milde retiriĝante je ĉiu paŝo malgrandiĝis sen perdi kontakton.

- Ĉu mi ne pezas tro, kara?

Ŝi ridetis kun fermitaj okuloj kaj amplene metis kiel respondo brakon ĉirkaŭ lian kolon.

- Ĉu mi vere ne pezas tro?
- Restu kuŝanta iom pli longe.

Ŝi ĝuis havi la kapon en la spaco de lia kolo. Kaj lia lango milde karesadis ŝian frunton.

Tiam ili vidis ke la lunlumo ne plu ripozis sur la nuptolito. La luno estis observinta grandan parton de la ludo de la amantoj.

Ili restis ankoraŭ iom da tempo en dolĉa ĉirkaŭplekto ĝis kiam lia amhobojo ŝovis el ŝia fonteto. Ili estis tro beate pigraj por forviŝi la amsukon. Ili kuŝis unu apud la alia, ŝi kun sia kapo en lia brako kaj sur lia brusto, li kun unu femuro sur ŝia sino kaj unu mano sur ŝia brusto.

- Beate, Eiristitis.
- Beate, murmuris ŝi. Ili fermis preskaŭ samtempe la okulojn. Kaj endormiĝis kun seka buŝo...

Estis Ammon kiu la unua malfermis la okulojn. Ĉu li estis dorminta? Jes, li estis dorminta. Kaj Eiristitis daŭre dormis. Kiom aminde kaj deloge ŝi kuŝis tie.

La kioma horo povus esti?

Estis tre mallume en la ĉambro. Ammon ekstaris kaj iris al la fenestro. Li metis sian kapon el ĝi. La luno estis subiĝinta.

Kiam li denove alvenis ĉe la nuptolito, Eiristitis ĵus malfermis la okulojn. Li sentis kiel ŝi ridetis beate.

- La luno estas for, Eiristitis.

Ŝi rektigis sin. Ŝi surpriziĝis.

- Ĉu estas jam tiom malfrue?

- La luno estas for. Baldaŭ la suno aperos en la ĉielon.

- Jes, suspiris ŝi. Ni havas nur unu horon plu, Ammon. Ni manĝu rapide ankoraŭ iom.

- Ne, por manĝi ne plu estas tempo se al amantoj restas nur unu horo, kara.

- Vi pravas, Ammon.

La dormo estis farinta bonon al ili kaj estis doninta novajn forton kaj deziron.

- Ĉu mi lumigu lampon?

Sed Eiristitis skuis la kapon.

- Mi vidas vin tiel ĉi, Ammon. Ĉu vi vidas min?

- Mi vidas vin ankaŭ.

- Kaj mi povas senti vin. Oni povas senti unu la alian eĉ kun la okuloj fermitaj.

Ŝi iris al la tablo kaj revenis kun kruĉo. Ili laŭvice trinkis de la ruĝa vino, kiu varmigis iliajn korpojn.

- Ĉu mi denove kantu mian kanton por vi, Ammon? Mian amkanton?

Li kapjesis nur kaj ŝi kantis la kanton kiun ŝi estis kantinta antaŭ la dormo, dum la nuptodanco. Sed ŝi kantis nur du versojn. Je la komenco de la tria linio ili jam kuŝis en la brakon de la alia, kaj kisis la lipoj de la virino la lipojn de la viro. Kaj sen alia preludo ili ludis unu la alian en ritma movado, kiel edzo kaj edzino, unufoje, dufoje, trifoje, rapide sinsekve. Por poste resti kuŝantaj en la brakoj de la alia, sen movoj krom la anhelado, kun okuloj fermitaj. Ĉu ili denove ekdormetis aŭ ĉu ili restis tie revantaj beate?

Kiam Eiristitis malfermis la okulojn, ekklariĝis jam en oriento. Ili denove surpriziĝis.

- Ammon, lumiĝas. Estas urĝe, diris ŝi.

La juna viro mire levis la okulojn. En ili estis nur granda malĝojo.

- Kial, kara? Ili ja venos forporti min, ĉu ne?

Sed ŝi forte neis per la kapo.

- Mi ne volas ke ili bruligos vin, Ammon. Mi volas revidi vin en la postmorta mondo, ĉu ne kompreneble?

- Kiel tio eblas, Eiristitis? Ili ja forportos min. KREDU, ne estas elirejo. Antaŭ ĉiu pordo staras tri gardistoj.

- Restas la malfermita fenestro, Ammon.

- Sed, mia kara Eiristitis, ĝi estas je dek kvin aŭ dudek metroj super la

tero.

Ŝi karesis lin sur la haroj per mola mano.

- Amo estas eltrovema, Ammon.

Ĉiam venkas la amo.

Ŝi iris al la lito, prenis la tukojn kiuj kuŝis sur ĝi kaj apud ĝi. Ŝi prenis ilin je la longa flanko kaj kunportis ilin. Ammon tuj komprenis. Liaj okuloj ekbrilis kaj li kapsignis.

Rapide li prenis la tukojn el ŝiaj manoj kaj interligis ilin per firmaj nodoj. Ŝi ankaŭ prenis la antilopajn peltojn de la planko, ili estis tre fortikaj.

Ammon vidis ke en tio kuŝis la savo kaj tamen li hezitis.

- Eiristitis, mia kara, vi faris promeson al ili.

Sed ŝi nur ridetis.

- Min ne trafos malbono, Ammon. Min oni ne metos sur la brulŝtiparon. Hodiaŭ mi kuniros kun la mortinta faraono en la tombejon por danci antaŭ li en la postmorta mondo. Poste ni eterne estos kune, estas la deziro de la dioj, mia kara.

Amo estas eltrovema.

Ĉiam venkas la amo.

Kiam ili estis ligintaj ĉiujn tukojn kaj peltojn firme, Eiristitis prenis unue

sian ruĝan kaj poste sian verdan robon por aldoni ilin al la ŝnuraĵo. Tion Ammon komence ne volis.

- Ne, Eiristitis, diris li, vi nun estas mia edzino, ili ne vidu vin nudan.

Sed ŝi respondis:

- Tio kio necesas, necesas, Ammon. La fenestro estas tro alte, mia karulo, miaj vestaĵoj helpas al vi kaj ili poste pensigos vin pri mi. Faru kion mi diras, Ammon.

Ili nun devis hasti. Ankoraŭ kelkaj mallongaj momentoj antaŭ ol la suno aperus super la horizonton. Ili ligis la supran parton de la memfarita ŝnuro al la lumhoko apud la fenestro kaj ĵetis la alian ekstremaĵon tra la fenestro. Eiristitis rigardis suben. Ŝi vidis ke la ruĝa robo ligiĝis al la verto de arbo.

- Ĉu en ordo, Eiristitis?

- Jes, Ammon. Iru nun. Mi revidos vin. Estas la deziro de la dioj.

- Ho, plej kara karulino.

La viro lastan fojon prenis la junan virinon en siajn brakojn. Kaj denove iliaj korpoj trovis unu la alian tiel ke ili forgesis sian haston.

Tie estis la suno... Oni frapis sur la pordon.

- Ho, Ammon, hastu!

Kaj denove frapo sur la pordon.

- Jes, mi venas! vokis ŝi.

Dum Ammon grimpis tra la fenestro kaj rapide subeniris, ŝi iris al ĝis la pordo.

- Mi venas, mi venas! Paciencu iom.

Ŝi denove estis ĉe la fenestro kaj rigardis eksteren. Ŝi vidis kiel ŝia novelo atingis la verton de la arbo. Rapide ŝi reentiris la procirkonstancan ŝnuron. Haste ŝi ĵetis ĉion sub la subenpendantan parton de la lito kaj rapide kuris al la pordo.

Oni frapis denove, malpli pacience nun. Eiristitis forŝovis la riglilon.

Estis Pluŝal mem kiu la unua eniris. La unuan momenton li havis atenton por nur la juna dancistino, kiu staris tie nuda antaŭ li kaj, kun la brakoj levitaj, dancis alte sur la piedfingroj malrapidan dancon, murmurante malnovan egiptan amkanton.

Pluŝal ne bone komprenis tiun strangan pozon, sed la aspekto ja plaĉis al li. Liaj maljunaj okuloj ekbrilis. Li faris plian paŝon en la ĉambiron, puŝis la gardistojn, kiuj volis eniri kun li, reen en la koridoron kaj fermis la pordon antaŭ iliaj nazoj. Kaj la tutan tempon Eiristitis pludancis, kun la junaj mamoj defie altaj kaj lulanta la koksojn. Kaj la murmurado transiris en mallaŭtan kantadon.

'Bela estas la amo,

la amo estas bela.

Estas la plej bela

en la mondo.

Homoj ekzistas por

ami unu la alian,

estas la dia deziro.'

Ĉu la maljuna Pluŝal pensis ke tiu ĉi kanto estis por li? Kie estis liaj pensoj? Kio ludis en la volviĝantaj cerboj de tiu maljuna kapo?

Kiam Eiristitis tre alproksimiĝis al li la tioman fojon, li dezirante etendis siajn brakojn.

'Venu, pura kolombo, flustris li, ĉiela aperaĵo, venu ĉe min. Ĝuu lastan fojon la vivon viro povas donaci al vi. Mi...

Sed ŝi glitiris inter liaj brakoj kaj diris:

- Mi bedaŭras, Pluŝal, mi ne intencis tiel ĉi. Mi de nun dancos nur por la faraono kaj apartenos al li. Estas la deziro de la dioj.

Kaj tiam li subite komprenis, ĉar stulta li ne estis. Li travidis ŝin. Estis kvazaŭ ebriga viro resobriĝis. Kiel li povis esti forgesinta la tutan tempon?

- La malliberulo! Kie estas la malliberulo? Kie estas Ammon? vokis li.

Eiristitis ĉesis danci. Ŝi metis la krudan robon de Ammon ĉirkaŭ la korpon. Ŝi trovis ĝin apud la lito.

- Kie estas tiu diabla Ammon?

- La dioj venis forpreni lin meznokte, kaj portis lin for de ĉi tie, al la lando de la arĝenta luno, respondis ŝi.

Ŝi diris tion kvazaŭ en ekstazo, kun la manoj kunfalditaj kaj la rigardo direktita supren. Ŝi diris kvazaŭ ŝi mem kredis.

- Mensogulino! Trompulino! Vi donis al mi vian vorton! Vi malobservis vian promeson ĉe la antaŭvido de la morto!

Sed ŝi ridetis nur.

- Estas la volo de la dioj, Pluŝal. La dioj estas plejpotencaj.

- Mi faros...

Ŝi interrompis lin.

- Vi nenion faros, Pluŝal. Ĉar jam hodiaŭ mi eniros la tombon, kune kun la mortinta faraono. Kaj nur por mia faraono mi dancos plu.

La vizaĝo de Pluŝal ruĝiĝis pro senpova kolero. Li ja estis potenca, sed kion li povis fari kontraŭ Eiristitis, la dancistino kiu efektive hodiaŭ kuniru en la tombon? Ŝi eskapos lian povon. Sed Ammon, li pentofaru! Tiun mi trovos, tiel certe kiel mia nomo estas Pluŝal! Kaj la junan viron mi rostos sur la brulŝtiparo ĝis restas nur iom da cindro.

Li kiel frenezulo kuris en la direkton de la pordo.

- Gardistoj! Gardistoj! Venu ĉi tien! Perfido!

Estis brumoviĝoj en la koridoro kaj vokado. Kvar, kvin gardistoj ensturmis la ĉambron.

- La malliberulo estas for!

- Sed sinjoro, kiel...

- Li estas netrovebla, mi diras al vi! Traserĉu la ĉambron. Ni devas trovi tiun diablan Ammon.

La ĉambro estis rapide traserĉita. La viroj forpuŝis la tablon kun la manĝaĵoj. Nenio.

La lito estis malplena. Ili renversis ĝin. Sub la lito ili trovis nur la kunligitajn litkovrilojn kaj la bestopeltojn.

- Ho, dioj, li eskapis nin tra la fenestro! vekriis Pluŝal. Li kuris al la ekstera muro, metis sian kapon tra la fenestro kaj rigardis suben. Li povis percepti nur rokojn kaj la vertojn de kelkaj arboj. Sed nenio kio moviĝis. Pluŝal peze suspiris.

Eiristitis intertempe estis preninta la procirkonstancan ŝnuron kaj malligis de ĝi la ruĝan robon. Ŝi respektoplene kisis la malhelan borderon.

- Mia kara, ruĝa robo, flustris ŝi, vi savis mian novedzon de la fajro.

Tiam ŝi demetis la krudan, brunan robon kaj metis la ruĝan sur sian nudan korpon.

La maljuna Pluŝal haste turnis sin.

- Rapide, suben! vokis li al la gardistoj. Ammon eskapis tra la malfermita fenestro. Kaptu lin, sed kaptu lin vivantan. Portu lin vivantan ĉe min.

Sed en sia koro li sciis ke ili ne trovos Ammon. Li estis jam malproksime kaj konis la ĉirkaŭaĵon. Kaj la gardistoj, ĉu ili ja konis Ammon? Jen plia senesperigo!

- Ammon? Kiu estas Ammon, sinjoro?

- Vi vidos. Li estas nude fuĝanta. Li kuras nude tra la arbaroj aŭ tra la dezerto. Hastu vi! Ekiru tuj!

Ili haste trairis la pordon al ekstere kaj subenkuris la ŝtuparojn.

Sed Ammon ne estis nuda kaj li ankaŭ ne plu kuris tra la arbaroj. Li estis jam atinginta la bordojn de Nilo. Tie li trovis krudharan robon kiun paŝtisto estis metinta tie kun sia ĉapelo, sia bastono, sia zono kaj sia ĉasaĵujo.

Ammon volvis sin en la robon, metis la ĉapelon sur la kapon kaj anstataŭmetis tie unu el la arĝentaj moneroj kiujn Eiristitis estis doninta al li. Poste li hasteme pluiris sian vojon, unue longan distancon laŭ la rivero ĝis kiam li atingis la rokojn. Li ankoraŭ ne malsatis. Sian soifon li fortrinkis ĉe fonto. Li estis jam pripensinta longan tempon: ĉu li iru al la piramido? Estis la ŝanco ke li lastan fojon vidus sian amatan novedzinon, sian novedzinon de unu nokto sed tamen por la tuta eterne.

Sed ne, tiu ŝanco estis malgranda, aŭ pli ekzakte, tute neekzistanta. Ĉiuj sklavoĵoj, ĉiuj kiuj kune kun la reĝo eniru la tombejon estos forkaŝitaj de la spektantaj okuloj per malhelaj vualoj. Ne, li ne irus tien, li ne risku esti rekonata kaj kaptata. Eiristitis estis tro bone zorginta lin. Malsingardemo ne kaŭzu ke ĉio misokazos.

Li subite sentis sin laca. Li kuŝigis sin en la ombro de roko, kun la paŝtista sako sub la kapo kaj la ĉapelo sur la vizaĝo. Jes, li sentis sin laca, ekstreme laca kaj dormema. La pasinta nokto ja fariĝis peza nokto. Tamen bonega nokto.

Li fermis kun beata suspiro la okulojn kaj endormiĝis preskaŭ tuj. Kaj li sonĝis ke li estis maljuna; maljuna, grizhara paŝtisto, kaj ke li loĝis kune kun Eiristitis kaj havis multajn infanojn: trankvila, revigliga sonĝo dum trankvila, revigliga nokto.

Li vekigis aŭdante voĉojn. Li havis ĝuste la tempon por retiri sin sub superpendanta parto de la roko. Kvar, kvin viroj preteriris lin je eĉ ne tri metroj. Ili ne rimarkis lin, feliĉe. Ili malaperis en kavaĵon de la roko, tuj apud li.

Kion tiuj viroj farus ĉi tie? Certe ankaŭ ili estis fuĝantaj? Ĉu ili venis kaŝi sin? Kiu alia engrimpus malluman kavernon en plena taglumo?

Post iom da tempo unu el ili revenis eksteren kaj laŭrigardis la vojon. Estis klare, ili atendis pli da homoj. Ammon laŭeble plej bone kaŝkaŭriĝis, por ke ili ne rimarku lin.

Post kelkaj minutoj la viro reiris internen.

Ammon restis kuŝanta, kvieta kaj aŭskultanta. Subite li ekaŭdis la trotadon de ĉevalhufoj; rajdanto alproksimiĝis, li estis tute ŝvitkovrita. Li saltis de sur sia rajdbesto kaj kuris senhezite en la rokkavaĵon.

La ĉevalo restis ekstere, klare ke ne temis pri fuĝantoj. Sed kiuj ja estis? Ilia ĉeesto vekis la scivolemon de Ammon. Li forlasis sian kaŝejon kaj enŝovis sin siavice en la malluman rokkavaĵon.

Estis relative granda kaverno kun kapricaj formoj. Ammon tute ne devis peni por teni sin nevidata de la ses viroj. Li ŝovis sin laŭ eble plej proksimen kaj streĉe aŭskultis kion tiuj uloj estis rakontantaj unu al la alia.

La lastalveninto aspektis tre ekscitita.

- Ĉu vi havas la mapon? demandis iu.

- Jes, mi havas. Pluŝal donis ĝin al mi. Li ankaŭ zorgos ke la gardistoj estos forvokataj.

- La tutan tagon?

- Kompreneble ne, nur mallongan tempon, kiam la suno staras je ĝia plej alta punkto. Li insistis: nur mallongan tempon, nenio veku suspekton.

- Do ni zorgu ke ni estu surloke?

- Jes. Ni havas ankoraŭ unu horon.

Ammon ne povis kredi siajn orelojn. Li sulkgigis la frunton. Kion sekretan tiuj viroj intencas fari? Ili parolis pri mapo, ili parolas pri forvoko de la gardistoj, ili parolis pri Pluŝal. Ĉu estus la sama Pluŝal, tiu de kiu li forfuĝis, Pluŝal, la potenca?

- Kiom longe ni restos en la piramido? demandis iu.

... Piramido?!... Ammon surpriziĝis aŭdante tiun ĉi vorton. Piramido... Kion tiuj ĉi viroj serĉos en la piramido? Kaj tio je la tago ke la faraono estos entombigata. Ammon alproksimiĝis iom pli. Li ne maltrafu eĉ unu vorton plu.

- Kaj kie ni lasu la akirotaĵojn? demandis la sama voĉo.

- Ne zorgu pri tio, ankaŭ tiu loko estas indikita sur la mapo.

- La akirotaĵo... la akirotaĵo... ripetis Ammon por si mem senvoĉe... la akirotaĵo... Ĉu tiuj estus tomboprofanantoj?

Ammon antaŭe aŭdis ke kelkaj reĝtomboj estis prirabitaj. Oni ĉiam trovas homojn, kiuj kuraĝas defii la povon de la dioj kaj kiuj taksas la posedon de oro kaj juveloj super la respekto kaj la amo al la dioj.

Jes, sendube estis tomboprofanantoj. Ili do planis enpenetri la piramidon, la tombejon de la ĵus mortinta faraono.

Kaj... Eiristitis troviĝas en la tombejo. Ĉu tiam ŝi ne estos en danĝero? Ĉu tiuj profanantoj ne faros malbonon al ŝi? Ĉu ili ne rabos de ŝi la vivon en la postmorta mondo kiel Pluŝal volis fari ankaŭ ĉe li?

Ammon suprenrigardis. Liaj okuloj estis timplenaj kaj sovaĝaj. Neniu rajtis intrudi la tombejon de la faraono, ankaŭ li ne. Sed ekde tiu ĉi momento, Ammon sciis ke li sekvos la profanantojn, tiu deziro estis pli forta ol li mem. Se sukcesos tiuj maliculoj kaj trovos la tombejon, tiam ankaŭ li estos tie por protekti sian amatinon, la dancistinon Eiristitis. Estis lia edzino, tio estis la deziro de la dioj.

Ankaŭ alia afero ludis en lia kapo. Kiu portis al la profanantoj la mapon kun la sekreta situo de la vera tombo en la piramido? La arkitektoj kaj la konstruintoj ĉiuj ja estis mortigitaj. Devas esti viro kun la plej alta aŭtoritato. Pluŝal? Sed provizore Ammon ne ricevis tempon por plupensi pri tio. Li vidis la virojn ekstari kaj pluiri.

Unu diris:

- Ni kvinope promenos antaŭe. Vi, Ibis, sekvos je malgranda distanco, vi rigardu ĉu neniu sekvos nin. Se estas danĝero, fajfu dufoje tra la fingroj. Atentu bone, Ibis, se io misokazas, oni bruligos vin vivan.

La viro, nomita Ibis, klinis sin respektoplene.

- Fajfi dufoje, ripetis li.
- Jes... dufoje. Ne pli.
- Ne pli, ripetis la viro.
- Kaj ne perdu nin el via vido.

La kvin viroj tiris la kufojn de siaj burnusoj sur la kapon. Ili estis vestitaj tute blanke. Male, Ibis portis krudan, malhelan robon. Li ja estis nur sklavo.

- Venu, ni iru do, diris la sama viro, kiu evidente estis la gvidanto de la grupeto.

Kaj ili iris, dum Ibis atendis respekteme, kiel ordonita al li.

Ammon pensis rapide. Aŭ ĉu li ne pensis? Sur la tero li vidis malhelan klabon. Kiam la grupo estis ekstere kelkajn minutojn, li prenis la klabon kaj ŝteliris en la direkton de la nesuspektanta Ibis. Li levis la klabon kaj subenigis ĝin sur la kapon de la sklavo. La viro eligis nenion; li falis senkonscie.

- Daŭros certe sufiĉe longe antaŭ ol li rekonsciigos, pensis Ammon preskaŭ voĉe. Mi bedaŭras kamarado, sed mi ne vidis alian solvon.

Ammon suspiris. Li rulis la viron sur la tero por senigi lin de lia burnuso. Tion li mem metis ĉirkaŭ la korpon, li rapide metis la kufon sur la kapon kaj kuris eksteren.

- Nun mi estas Ibis, la sklavo. Ibis, la sklavo; estas la deziro de la dioj,

flustris Ammon.

Li sekvis la grupon je malgranda distanco. Iam kaj tiam unu el la viroj rigardis malantaŭ sin kaj kapsignis aprobe: ilia sklavo sekvis ilin, laŭ ilia ordono.

Ankaŭ Ammon iam kaj tiam rigardis malantaŭen, sed li estis bonŝanca. De la sklavo Ibis provizore ankoraŭ ne estis spuro. Tamen trankviligis lin kiam li post iom da tempo vidis la grupon turni dekstren kaj malaperi en kavaĵon de roko. Li ekkuris, li ja ne rajtis perdi la kvinopon el sia vido.

La kvin viroj evidente tiel pensis ankaŭ, ĉar ili atendis en la enirejo de la kaverno ĝis kiam ili vidis Ammon alproksimiĝi je deko da paŝoj. Tio siavice maltrankviligis Ammon.

- Mi nur esperas ke mi ne devas eniri la grupon kaj ke ili parolos kun mi, murmuris li duonvoĉe.

Sed feliĉe ili ne faris. Ili plueniris la kavernon.

Ammon mallonge rigardis malantaŭ sin. De Ibis ankoraŭ nenio videblis. Kiam la juna viro rigardis la alian flankon, li vidis la piramidon leviĝi alte super si. Sed la kvieta giganto ne aspektis minace. Estis kvazaŭ la pinto signis afable. Estis la volo de la dioj, la dioj sendube estis kun li. Tio donis al li la kuraĝon persisti.

- Ibis, sekvu nin, vokis iu de antaŭ li ordone. Aŭskultu la sonon de niaj paŝoj. Ĉu komprenite?

Ammon hezitis. Ĉu lia voĉo ne denuncos lin? Sed ne, tiu ŝanco estis

malgranda, en spaco de kaverno voĉo sonas tute alie. Kaj li ĉiukaze devis respondi. Li venkis sian heziton kaj diris:

- Jes, sinjoro.

Li streĉe aŭskultis la sonon de iliaj paŝoj. Ili daŭrigis sian vojon. Ammon spiris senpezigitte.

Post kiam ili iom progresis en la kaverno, la vojo krute ekiris alten. La kvin viroj denove haltis. Unu el ili komencis bati per martelo kaj iom poste, Ammon aŭdis ke ili malfermis lukon. Kaj tiam subite estis pli da lumo. Unu el la viroj estis lumiginta torĉon. Kaj plian, kaj ankoraŭ unu.

- Ibis...

- Jes, sinjoro.

- Venu ĉi tien. Venu ĝis ĉe ni.

Jen, nun okazas. Sed kion Ammon povis fari? Fuĝi? Reiri? Por tio ankoraŭ ne estis tro malfrue, nun ankoraŭ ne. Sed tio ne alportos solvon. Li devis gardi Eiristitis, sian amatinon el la ungegoj de tiuj uloj. Tio estis la volo de la dioj kaj ankaŭ la celo de li. Li do post mallonga hezito pluiris antaŭen.

Kiam li atingis la kvinopon, unu el ili transdonis al li torĉon. Ammon prenis ĝin kaj ekstaris tiel ke ili ne povu vidi lian vizaĝon. Nu, ili ankaŭ ne rigardis lin, ili pensis pri nur unu afero: pri la trezoroj, pri la oro, kaj pri la malmulta tempo kiu restis por realigi la planon.

- Vi daŭre sekvu nin, Ibis, kaj vi gardu nin. Ĉe ĉiu ajn suspektinda sono, vi fajfu dufoje, komprenite?

- Jes, sinjoro.

La aliaj intertempe estis jam rigardantaj la mapon, ĉe la lumo de la du aliaj torĉoj kaj kiun tenis unu el ili malfermita.

Ĉu ili ne timis ke ilia sklavo Ibis poste denuncos ilin? Sed ne, tion Ammon bone sciis: kiam la oro kaj la tombotrezoroj estos en ilia posedo, ili mortigus Ibis. Mortinta viro ne plu povas paroli. Poste ili dividus la rabitaĵon. Aŭ ĉu ili provus mortigi unu la alian? Tia afero ja ne fortimigas sakrilegiulojn. Dividi trezoron signifas malpli por si mem. Kaj kiam la aliaj estus mortintaj, ankaŭ ili ne plu povus paroli. Grave estis agi plej saĝe por postresti sola.

Ili grimpis tra la truon kaj plupromenis, Ammon sekvis ilin kun la torĉo en siaj manoj. Ili devis supreniri, malsupreniri, dekstren, maldekstren, labirinto de koridoroj, foje malfacile ireblaj aŭ grimpeblaj. Sed Ammon estis juna kaj facilmova, li facile povis sekvi ilin.

Finfine ili atingis grandan salonon. Tie kuŝis la korpoj de la mortigitaj sklavoj, kiuj estis enirintaj la tombejon kune kun la faraono. Ili kuŝis tie kun la manoj falditaj sur la brusto kaj la okuloj fermitaj. Unuavide ili estis mortintaj pacan morton. Kiam Ammon vidis tiujn multajn mortintojn, timo ekposedis lian koron. Ĉu ili mortigis ankaŭ Eiristitis? Sed ne, tion li sciis de malnovaj rakontoj, restis ankaŭ vivantaj sklavoj, ili restis vivaj tiel longe kiel ili povis. Sed kiu povis scii kiuj mortis kaj kiuj restis vivaj dum ankoraŭ iom da tempo?

Ammon haste kuris laŭ la korpoj kaj lasis la lumon de sia torĉo brili sur la vizaĝojn. Sed li vidis neniun virinon.

La aliaj estis jam ŝtelirintaj en koridoron.

- Ibis! Kie vi restas?

- Mi venas, sinjoro.

Li obeeme sekvis la aliajn. La vojo ŝajnis senfina. Kaj ĉiun malgrandan salonon kaj ĉiun niĉon traserĉis Ammon per fervoraj okuloj. Oro ne interesis lin, li devis trovi sian amatinon.

- Ho, Eiristitis, mia amata, suspiris li. Kie vi troviĝas? Kie vi restadas?

Kaj tiam ili atingis malpuran, disfaleman koridoron, ŝajnis esti koridoro kiu restis nefinfarita. Ĝi direktis al krudligna pordo, sen alia elirejo.

Unu el la viroj blasfemis.

- Tiu diabla Pluŝal. Li perfidis nin!

Sed unu el la viroj, kiu portis torĉon, diris:

- Jen, tenu tiun torĉon por mi kaj lumigu al mi.

Per malgranda hakilo kaj martelo li komencis prilabori la pordon, ĝis kiam ĝi saltis el ĝiaj hinĝoj. Kaj kion ili tiam vidis, rigardis ili konfuzite kaj mute. Ili staris vid-al-vide de la reĝa ĉambro. La vandoj estis ornamitaj per belegaj kolordeseĝnaĵoj, kiuj reprezentis la vivon de la faraono. La belaj deseĝnaĵoj evidente ne interesis ilin. Ja la oraj bovloj, la pokaloj kaj kalikoj, ornamitaj kun grandaj gemoj kiuj brilis en la dancanta torĉlumo. Kuŝis ringoj kaj ĉenoj, ĉiuj oraj, kaj grandaj bovloj kun oraj moneroj, por pagi la transiron post la morto. Ankaŭ peza reĝa sceptro. Staris ora trono kun dorsflanke la bildo de la faraono.

La viroj estis falintaj surgenu kaj ekpalpis la orajn juvelojn kaj pesis ilin en la manoj. Tamen Ammon ne havis atenton por tio. Ĉe la unua paŝo kiun li estis metinta en la reĝan ĉambron, li vidis en la mallumo de unu el la niĉoj iun movon. Ĉu estis besto? Eble venena serpento, enportita ĉi tien por protekti la faraonon ankaŭ post ties morto? Ammon singarde ŝovis sin pli proksimen. La kvin viroj ne atentis la sklavon. Li nevidite atingis la niĉon. Tiam li vidis ke tio kio antaŭe moviĝis, estis piedo, la piedo de homo. La piedo estis en fajna, kun oro surstebita sandalo, la piedo de virino do. Kaj intuicie, Ammon sentis ke estis Eiristitis, kiu estis kaŝinta sin tie. Eiristitis, la dancistino de la mortinta faraono.

- Ho, Eiristitis, flustris li.

Ŝi suprenrigardis al li, surprizita. Ŝi pensis ke ŝi sonĝis.

- Ho... Ammon... Kiel vi venas...

- Sst... sekvu min.

La kvinopo ankoraŭe sidis surgenuita ĉe la trezoroj. Ili ne rimarkis la du homojn kiuj forglitis laŭ la vando. Momenton poste ili staris ekstere.

- Nun ni devas laŭ eble plej rapide esti for el tiu ĉi piramido, diris Ammon. Ion pli li ne diris.

Ĉu estis la volo de l' dioj? Ĉu Ammon estis enkapiginta parton de la vojo? Ne, certe ne estis tio. Ĉu simple estis la bonŝanco, kiu ofte akompanas la geamantojn?

Estis la volo de la dioj. Ili eliris post iom da tempo laŭ alia elirejo, ne haltigitaj de iu ajn.

Ili eliris plenan mallumon, ĉar Ammon estis estinginta sian torĉon antaŭ ol eniri la reĝan ĉambron. Nun, elirante la piramidon, la forta lumo kvazaŭ blindigis ilin. Ili interprenis la manojn kaj surprizite fermis la okulojn. Poste ili tre singarde malfermis ilin ĝis kiam ili estis adaptintaj sin al la brilega lumo kaj povis denove vidi. La tuta ebenaĵo, sin etendante senfine antaŭ ili, estis dezerta. Malantaŭ ili, la granda, giganta dekliva muro de la piramido leviĝis alte. Sed en ĝi kuŝis nenia minaco. Ili kvazaŭ sentis ĝian subtenon.

'Ĉiam venkas la amo.'

Eiristitis turnis sin.

- Pardonu min, granda faraono, diris ŝi, sed mi ne dancos por vi. Mi forlasas vin.

Ammon kapsignis.

- Tiel decidis la sorto, kara mia. Estas la volo de la dioj.

Tiam ili rapide foriris de la tombejo. Ili kuris manon en mano tra la ebenaĵo. Vespero alproksimiĝis sed ankoraŭ estis varme. La tero tie estis iom dekliva. Ili forlasis la sablan dezertejon kaj atingis la verdan zonan. Ili alproksimiĝis Nilon.

Atingintaj la bordon, la du geamantoj turnis sin lastan fojon. Tre fore, ili vidis malantaŭ si la pintan plombecon de la brilanta piramido, akre konturita kontraŭ la lumo de la ĉielo, kaj malhele kontrastanta kun oranĝkolora ĉielo. La piramido leviĝis alte kaj forte, sed ne, en ĝi estis neni minaco.

- Estas la volo de la dioj. Ĉiam venkas la amo, flustris Ammon.

Tiam ili kisis unu la alian kaj malvestis sin. Kaj dum ili etendis sin sur la teron kaj iliaj korpoj unuiĝis, ili rigardis unu la alian enamiĝinte en la okulojn kaj iliaj manoj karesis la kapon de la alia, la bruston kaj la membrojn. Ili interkaresis ĉie, dum ili priludis la alian kaj estis beate, estis bone. Estis la volo de la dioj.

Kaj kiam ili estis sataj kaj ŝvitaj de la eterna ludo, ili kuŝiĝis sin apud la alia kun fermitaj okuloj, lia mano en ŝia mano.

Kiam ekfariĝis tute mallume, ili transnaĝis Nilon, tra la trankvila, bruna akvo, riĉa je nutraĵoj por arbo kaj planto, Nilo, la vivofonto de la tero.

Sur la alia bordo, kelkajn tagmarŝojn suden kaj tagojn poste, ili konstruis loman kabanon. Tie ili vivis sobre sed feliĉe unu ĉe kaj apud kaj kun kaj en la alia, dum ankoraŭ multaj, multaj jaroj kiel edzo kaj edzino. Kiel edzo kaj edzino...

La poeto estis ĉe la fino de sia longa rakonto. Silvia levis sian kapon kaj rigardis lin per siaj bluaj okuloj.

- Kiel edzo kaj edzino ... kaj ĉu ili havis multajn infanojn?

Marko kapjesis.

- Kaj ili havis multajn infanojn, efektive. Infanojn, kiuj havis malhelajn harojn kaj okulojn kaj estis tre belaj, kiel ilia patrino. Estis la volo de la dioj, Silvia.

Silvia ekstaris. Ekstere estis fariĝinta preskaŭ tute mallume nun. La flamoj de la fajrejo ludis ruĝe kaj flave sur ŝia longa robo, kiu pendis

suben ĝis sur ŝiaj nudaj piedoj. Ŝi ekstaris tuj apud Marko, tiel ke li sentis la varmajn odorojn de ŝia korpo. Ankoraŭ kuŝanta, li rigardis supren kaj vidis la svagajn konturojn de ŝiaj mamoj sub la supra robo.

- Estis longa kaj bela rakonto, kara poeto, diris ŝi.

- Venu do, blua feino kaj surgenuiĝu apud mi.

Sed ŝi skuis la kapon kaj ridetis.

- Ne, respondis ŝi, ne, mia potenca faraono. Unue mi dancos por vi. Malvestu vin, se mi rajtas peti vin.

- Ĉu ni atingis la punkton kie sensignifa sklavino ordonas sian potencan mastron? Ŝian faraonon, kiu regas super vivo kaj morto kaj loĝas ĉe la dioj? parolis Marko severe.

- Pardonu min, mia potenca faraono. Pardonu min, sed estas la volo de la dioj. Ĉu mi rajtas peti vin? Tiam malvestu vin kaj mi dancos por vi.

Kaj ŝi surgenuiĝis apud lin kaj mem malbutonis lian ĉemizon. Nun li hastis kun stranga hastemo.

Kiam li kuŝis nuda ĉe ŝiaj piedoj, ŝi klinis sin antaŭen kaj kisis lian buŝon. Ŝiaj lipoj estis malsekaj kaj varmaj kaj la fajna pinto de ŝia lango faradis glitajn movojn.

- Venu, venu rapide ĉi tien, Silvia.

- Trankvile, trankvile, kara faraono, respondis ŝi, dum ŝi milde karesis lian vangon per la pintoj de ŝiaj fingroj. Sed lia trankvilo estis for. Ŝi vidis lian fortikan obeliskon, kiu leviĝis el inter la bukloj de la malhela arbusteto.

- Unue mi dancos por vi, potenca, fierfa faraono, ripetis ŝi, dum ŝi levis sin

kaj ekstaris apud la fajro.

Marko bridis sin kaj restis kuŝanta sur la planko, sur sia flanko kun la vizaĝo al la fajrejo. La fajro metis malhele ruĝajn flamojn en liajn malhelajn, avidajn okulojn.

Li vidis la bluan robon kaj la ludadon de la flamoj sur la desegno. Silvia staris tuj apud li, alte rektiĝinta, kun la du piedoj unu firme kontraŭ la alia. Kaj tiam, laŭ imagita muziko, ŝi komencis danci. Ŝiaj piedoj tamen restadis sur la sama loko dum iom da tempo, sed la resto de ŝia korpo eklulis; la genuoj, la femuroj, la per la robo kaŝita sino. La movado daŭrigis supren, laŭ la mamoj kaj ŝultroj al la kapo. Sed estis speciale la brakoj kiuj dancis, kun iam kaj tiam klina moviĝo de la korpo. Kaj la tutan tempon la silenta muziko, de kiu Marko povis sekvi nur la ritmon, dank' al la per la korpo vivantaj linioj de la danco.

Kaj dum Silvia per unu mano malfiksis la ŝelketojn de ŝia robo, ŝi tiris la longajn harojn liberaj per la alia mano, en gracia movo. La brilaj haroj falis kiel akvofalo sur ŝian kolon ĝis la ŝultroj, dum la malbutonita robo glitis laŭ ŝia alabastra korpo suben.

Kaj, en tiu ĉi momento, kiam la dancistino staris nuda apud la flamoj, ankaŭ la piedoj ekmoviĝis kaj la femuroj kaj la koksoj kaj Silvia defie lulis sian sinon. Kaj ŝi anhelis

- Premu la butonon, Marko, premu la butonon, plejkara.

Kaj sen forturni siajn okulojn de ŝi, li premis la butonon de la registrilo. Nun estis muziko, vera muziko, muziko de *Ravel*, la kuntrena muziko de lia *Bolero*.

La *Bolero* de *Ravel*. Marko mallonge fermis la okulojn. Silvia sciis ke la

poeto ŝatas la *Boleron*, sed ŝi estis ankoraŭ neniam dancinta ĝin por li, neniam nuda, ĉe la lumo de la ruĝaj, lekantaj flamoj de la fajrejo.

Kiam li denove malfermis la okulojn, li vidis ĉiujn membrojn de ŝia korpo moviĝi, li vidis kiel la muziko de *Ravel* traardis ŝian korpon, direktante ŝian dancadon. Kaj estis kvazaŭ la arĉoj de la violonoj ludis ŝiajn mamojn. Kiajn sentojn tiu muziko vekis en ŝi, kial ŝi malfermis siajn brakojn en invita gesto? Venis tremo en ŝiaj mamoj kaj la cicoj fariĝis pli malmolaj kaj grandaj. Kaj ŝi metis la piedojn pli dise, la genuoj kaj la alabastraj femuroj kaj sub ŝia malhela triangulo sin malfermis ŝia sino. Aŭ ĉu Marko revis, nur imagis tion?

Li duonrektigis sin el sia kuŝa pozicio, ĝis sur unu genuo. Silvia dancis tuj antaŭ li kaj klinis sin al li, tre profunde. Dum ŝi mallonge karesis lian antaŭendirektitan viraĵon per la dorsflanko de ŝia mano, li vidis la ŝancon por tuŝeti cicon per sia lango. Tiu estis malmola kaj varma. Marko dezire ekkaptis ŝin per ambaŭ manoj, sed ŝi ridante forŝovis sin de li. Li tuŝis nur la kurbaĵon de ŝiaj altaj femuroj. Suprenrigardante, li vidis ŝian malhele brunan dorson kaj la pli helajn glutemontetojn kaj la koksan valon, kiu enfalis profunden sub la fajne formita torso kaj ŝiaj svingantaj haroj.

Kiom bela ŝi estis, lia Silvia. Kaj tenere li - nur momente - pensis: ŝi estas bona ankaŭ.

Denove li vidis nur ŝian malhelan belecon, kiu formis akran kolorkontraston kun la moviĝantaj ruĝo kaj purpuro kaj bluo kaj verdo kaj flavo de la flamoj.

Mallonge ŝi ĉesis danci kaj ĵetis blokon da ligno en la fajron. Fajreroj eksaltis supren, kaj centoj da kolorfulmetoj, nuboj de polvo.

Kaj Silvia dancis denove, ankoraŭ pli proksime. Ŝi venis malorte de maldekstre, kun la dekstra genuo antaŭen. Movanta sin, ĉiam dancante,

nun kun malrapidaj, ekstreme malrapidaj movoj kontraste kun la rapida ritmo de la *Bolero*.

Denove ŝi klinis sin super lin, tiel ke ŝia mamu tuŝis lian vizaĝon. Kaj dum ŝi kokete lasis lian buŝon priludi ŝiajn cicojn, li karesis la fendon de ŝia sino per la singardaj fingroj de ambaŭ manoj. Kaj li sentis ke ŝiaj lipoj estis malsekaj kaj dezirantaj je pli ol mankaresoj.

Li turnis sin surgenuen, kaptis ŝin ambaŭmane kaj lasis sian buŝon kisanter subeniri laŭ ŝia korpo. Ŝi kuŝigis sin tutsterne sur la plankon kaj tiris lin kun si. Li karesis ŝiajn genuojn, li karesis ŝiajn femurojn, li ĝuis la mildan odoron de ŝia sino. Kaj kiam li per sia lango lekis la blankan kurbaĵon sub ŝia umbiliko, li sentis kiel ambaŭ ŝiaj manoj invite puŝis lian kapon pli suben. Ŝi antaŭis lin, ŝi trovis lian obeliskon; li trovis ŝian varman fonton. Kaj ili ludis unu la alian per dorlotaj kisoj kaj lekoj, dum ili per ambaŭ manoj interpuŝis siajn korpojn pli proksimen kaj iliaj muskoloj pro bonsentego alterne kuntiriĝis kaj malstreĉiĝis. Ŝi surpriziĝis kiam ŝi sentis strangan vibradon en lia fortika lanco. Haste ŝi liberigis sin el lia ĉirkaŭplekto.

- Ho, kara, turnu vin. Turnu vin rapide.

Ŝi ruligis sin surdorsen kaj malfermis ŝiajn femurojn. Ŝi anhelis.

- Venu, Marko. Venu.

Li anhelis. Li surgenuiĝis inter ŝiajn genuojn kaj kisis ŝin.

Avide ŝi rigardis lian grandan, streĉantan viraĵon.

- Venu, mia forta faraono, flustris ŝi. Venu.

- Jes, mia kara, mia kara sklavino.

- Ĉu mi rajtas resti ĉe vi, faraono?
- Jes, mia kara sklavino, mi ĵuras tion al vi. Vi ĉiam restu ĉe mi.
- Ankaŭ post via morto?
- Ĉiam. Ankaŭ post mia morto.
- Venu do, diris ŝi. Kaj ŝi malfermis por li sian molan sinon.

Sed li regis sin, restis inter ŝiaj femuroj sidanta surgenu kaj, dum li kisis ŝian buŝon, li karesis per la polmo de siaj manoj ŝiajn molajn mamojn.

- Venu, mia kara faraono.
- La hindoj instruis al mi ke sinrego dum la ĝuado multigas la ĝuon, respondis li.

Ŝi kisis lin sur la buŝon.

- La hindoj estas saĝaj, ili estas la ŝakludantoj de la amo. Sed vi, ho mia reĝo, vi estas la egipta faraono.
- Ankaŭ la egipta faraono estas saĝa viro. Li eĉ pretas lerni ion de la hindoj, respondis li.
- Mi petas, mia kara faraono, faru nur unu fojon tion kion petas via sklavino.
- Nenion mi pli volonte faros, kara.
- Jes, kapumis ŝi, kaj faru bone. Faru kiel la hindoj, ne tro rapide... kaj kun sinregado.

Intertempe la muziko estis finita. La *Bolero* de *Ravel* estis jam tre for. Sed ĉu iu el ambaŭ estis rimarkinta tion?

La faraono klinis sin super sian amatan sklavinon, kaj, dum li etendis ŝiajn femurojn ankoraŭ iom pli, ŝi prenis lian oran glavon kaj ŝovis ĝin en ŝian ingon, ĝuste ĝis la loko kie la fajro plej impete brulis.

Sinregado... ne tro rapide... ĉiuj vortoj bonaj. Sed ĉu ili taŭgas en tiaj momentoj por juna poeto, kun glavo kiel fontano kaj pelvoj plenaj je ardanta fajro?

Ili kisis unu la alian per varmegaj lipoj. Ili premis la buŝon en tiun de la alia kaj la brustojn kaj la brakojn kaj la femurojn unu en la alian kaj la piedojn sed multe pli profunden la interkompletigajn sinojn.

Kaj kiam la granda faraono ŝanĝiĝis en flamantan salvon de centaj rapide kreskantaj fontanoj, en la sama momento ankaŭ lia kara sklavino atingis sian orgasmon kaj lia semo kaj ŝia fluidaĵo kunfluis kaj unuiĝis. Estis la volo de la dioj...

Marko flustris ankoraŭ:

- Mia kara, kara sklavino, vi ĉiam estos kun mi.

Kaj ŝi diris:

- Kaj la dioj permesu ke ni vivu longe kaj ke ni havu multajn infanojn. Kaj mi esperas...

Marko rigardis ŝin ĉarmita.

- Kion vi esperas, Silvia?

- Ke ili ĉiuj fariĝos tiom amindaj viroj kiel sia patro.
- Kaj la knabinoj tiom agrablegaj kiel sia patrino, Silvia.

Kaj ili kuŝadis beate unu apud la alia kaj diris nenion dum iom da tempo.
La luno aperis en la ĉielon.

Jen estis la fino de tiu longa dudeka tago.

Stranga virino

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la novelaro. Aĉetu ĝin de www.retbutiko.be

La labirinto

Tiu ĉi ĉapitro aperas nur en la plena versio de la novelaro. Aĉetu ĝin de www.retbutiko.be

Kolofono

Titolo: La egipta dancistino

Aŭtoro: Leopold Vermeiren

Tradukis: Lode Van de Velde

Kovrilo: Hugo Fontyn

Tekstaranĝo: Erik D'Hondt kaj Paul Peeraerts

ISBN: 978 90 71205 79 7

UDK: 82.3.892

NUR: 330

Leĝa depono: D/1999/2924/1

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekensstraat 169 - 2060 Antverpeno

www.retbutiko.be

© 2000 FEL, Antverpeno

Tiu ĉi libro estas la daŭrigo de „La nuda feino”, „La ludanta lumo” kaj „La bela petveturantino”. Ĝi tamen estas ĝuebla ankaŭ kiel aparta novelaro.

Tiu ĉi ekzemplero de „La egipta dancistino” estas nur parto de la
kompleta verko. Tiu ĉi eldono rajtas esti libere kopiata.